

IL POPOLO

中國報道

CHINO


9

1985






La te-kunsido okaze de la 35-jara jubileo de El Popola Ĉinio



EPĈ FESTAS SIAN 35-JARAN JUBILEON

Fotoj de la redakcio

*Vicĉefministro Jaŭ Jilin kaj
s-ano Ian Curzon Jackson,
reprezentanto de UEA*




*Jaŭ Jilin (la dua de maldekstre),
vicĉefministro de la Ŝtata Konsi-
lantaro, Hujucz (la unua de mal-
dekstre) kaj Hŭang Hŭa (la tria
de maldekstre), vicprezidantoj de
la Konstanta Komitato de la Ĉina
Popola Kongreso, en la te-kunsido*



*Jaŭ Jilin (la dua de dekstre) interparolas kun Jerzy Leyk (la tria
de dekstre), reprezentanto de la Pola Esperanto-Asocio. Plej
dekstre sidas Lju Ĝiŝjan, vicministro de la Kultura Ministerio de
Ĉinio.*



Hujucz manpremas jugoslavan gaston Živko Milojević. Plej maldekstre staras Ŝju Ŝanŝu, vicedstro de la redakcio de EPC.



Cu Tunan (la unua de maldekstre), membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto", Ĝoŭ Ŭejĝi (dekstre), aganta kultura ministro, kaj Ian Curzon Jackson (la dua de dekstre), reprezentanto de UEA, en la te-kunsido


Hŭang Hŭa manpremas Franciszek Kalinski, anon de la reprezentantaro de la Pola Esperanto-Asocio. Dekstre staras Jang Jumo, vicĉefredaktoro de la redakcio de EPC.



Hŭang Hŭa (la tria de maldekstre) kaj Vilmos Benczik (la unua de maldekstre), reprezentanto de la Hungara Esperanto-Asocio, William R. Harmon (la dua de maldekstre), reprezentanto de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, kaj Miyamoto Masao (la unua de dekstre), reprezentanto de la Japana Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj



Hŭang Hŭa (maldekstre) kaj Miyamoto Masao (meze)



Cen Jŭan (staranta), vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj Louise Marin (maldekstre), reprezentanto de la Unuiĝo Franca por Esperanto



Gang Čiĉeng, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj Irena Szanser, ano de la reprezentantaro de la Pola Esperanto-Asocio



Ge Baŭĉjŭan (meze), prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, manpremas japanan s-anon Moĉizuki Masahiro.



Fama ĉina verkisto Je Ĝjunĝjan, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj hungara s-anino Maria Benczik



Maŭ Dafeng (dekstre), konsilanto de la redakcio de EPC, kaj Nagase Yosikatu, reprezentanto de la Japana Esperanto-Instituto



Li Najŝi (dekstre), vicĉefsekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj japana s-ano Takenaka-Ĝisuke

FESTO DE ESPERANTISTOJ

—CELEBRE AL LA 35-JARA EKZISTADO DE “EL POPOLA ĈINIO”

de MEJ ĜI, raportistino de la redakcio


Por celebri la 35-jaran ekzistadon de la revuo “El Popola Ĉinio” la redakcio okazigis grandan tekunvenon en la Nacia Kultura Palaco, Pekino, posttagmeze de la 21-a de majo.

Estis serena tago. Laborantoj de la redakcio frue venis al la kunveno por bonvenigi la gastojn kaj dividi kun ili la ĝojon.

La tekunvenon ĉeestis pli ol 300 personoj. Ĝin honoris per sia ĉeesto kandidata membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro Jaŭ Jilin, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de ĈEL Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK Hŭang Hŭa, aganta ministro de Kulturo de ĈPR Ĝoŭ Ŭejĝi, vicministro de Kulturo de ĈPR Lju Ĝiŝjan, prezidanto de la societo “Amikoj de Esperanto” Ĉu Tunan, vicprezidanto de ĈEL Ĉen Ĵuan kaj multaj aliaj famaj veteranaj esperantistoj. Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ la antaŭaj laborantoj de la redakcio de EPCĉ, ĝiaj legantoj kaj amikoj de la belarlistaj, ĵurnalistaj kaj aliaj rondoj. Pli ĝojige estas, ke la kunvenon ĉeestis ankaŭ 13 eksterlandaj gastoj, reprezentantoj de UEA kaj Esperantaj organizaĵoj de iuj landoj kaj niaj perantoj, speciale venintaj al Ĉinio por partopreni en la celebrado.

Kiam la 89-jara Hujucz venis al la kunveno, mi petis lin kritiki nian revuon, li ĝustigis min, ke la revuo EPCĉ ne estas via, ĝi apartenas al la tuta esperantistaro.

Hujucz estas unu el la iniciatintoj de nia revuo, li diris prave, ke EPCĉ apartenas ne nur al la dekoj da laborantoj de nia redakcio, sed ankaŭ



Sju Sanŝu, vicedestro de la redakcio de EPCĉ, donas salutvortojn en la te-kunsido.

al la tuta esperantistaro kaj ĉiuj niaj amikoj, kiuj amas nian lingvon. Jam antaŭ 2-3 monatoj la redakcio ricevis skribaĵojn kaj gratulajn leterojn de la ŝtataj gvidantoj Jaŭ Jilin, Hujucz kaj de Bakin, Ĉu Tunan kaj Lu Ĝjaŝji (prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj) kaj aliaj en- kaj eksterlandaj amikoj de esperantistaj rondoj. Famaj ĉinaj kaligrafoj kaj pentristoj Ĝang Ding, Hŭang Mjaŭzi, Fej Ŝin-ŭo, Lu Gŭangĝaŭ, Ĝoŭ Hŭajmin, Dong Ĉenŝeng kaj aliaj faris por nia revuo kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn por celebri la feston. Vere feliĉe estas por ni, ke tiel multaj amikoj prizorgas kaj subtenas la revuon.

35-JARA JUBILEO DE EL POPOLA ĈINIO



Ges-anoj el diversaj landoj en kunsido aranĝita de la redakcio de EPC

Donacoj faritaj de niaj gastoj al la redakcio





Jelezo (maldekstre), vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, manpremas s-anon Ian Curzon Jackson ĉe vespermanĝo aranĝita de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj LKK de la 71-a UK por diverslandaj esp-istoj invititaj al la 35-jara jubileo de EPC. Meze staras vicĉefredaktoro Li Siĝjun.


En la kunveno unue parolis Ŝju Ŝanŝu, respondeculo de la redakcio. En la nomo de la redakcio li esprimis sian varman bonvenigon al la gastoj kaj korajn dankojn al la gvidantoj kaj samideanoj ĉinaj kaj eksterlandaj ĉiam subtenantaj kaj helpantaj nian laboron en la pasintaj jaroj.

EPC estas unu el la plej fruaj fremdlingvaj revuoj de la nova Ĉinio. En la pasintaj 35 jaroj ĝi funkciis kiel fenestro de alilandaj esperantistoj por koni Ĉinion. Nun la revuo estas distribuita en pli ol 80 landoj kaj regionoj, kaj la totala distribuita kvanto superis 17 000 ekzemplerojn.

Lju Ĝiŝjan, vicministro de Kulturo faris paroladon en la kunveno. Li alte taksis la kontribuojn de la revuo en la pasintaj 35 jaroj. Li esperis, ke la funkciuloj de la redakcio pli intimigos siajn interrilatojn kaj kunlaboron kun la legantoj por fari pli da kontribuoj al la progreso de la homaro kaj la paco de la mondo.


Ian Curzon Jackson, reprezentanto de UEA, Jerzy Leyk, prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio, Vilmos Benczik, reprezentanto de la Hungara Esperanto-Asocio, Nagase Yosikatu, reprezentanto de la Japana Esperanto-Instituto, kaj William R.

Maljunaj esperantistoj sur la Granda Muro





Diverslandaj s-anoj sur la Granda Muro



Niaj gastoj en la pitoreska urbo Hangôŭ

Harmon, reprezentanto de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, faris entuziasmajn paroladojn ĉe la kunveno. Ili unuvoĉe laŭdiŝ la principon de EPĈ, opiniante, ke ĝi estas unu el la plej belaj Esperanto-revuo en la mondo kaj deziris, ke ĝi akiru pli da sukcesoj en la estonteco.

Se oni diras, ke EPĈ rolas kiel ponto inter la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj por ilia interkompreniĝo, do la celebrado donis al la ĉinaj kaj alilandaj samideanoj bonan okazon por senpera kontakto. Antaŭtagmeze de la 21-a, nia redakcio invitis la 13 eksterlandajn samideanojn al kunsido. En la kunsido la gastoj faris siajn rimarkigojn kaj multajn bonajn proponojn rilate la enhavon, presadon kaj distribuadon de la revuo.

S-ano Vilmos Benczik estas ankaŭ ĉefredaktoro de la revuo "Hungara Vivo". En la kunsido kiam li humure diris, ke EPĈ kaj la "Hungara Vivo" nun konkurencas en konigado de E-movado kaj servado al la tutmondaj esperantistoj, s-ro Laŭlum, vicĉefredaktoro de EPĈ, demandis lin kun rideto: "Ĉu vi timas la konkurencon?" Vilmos Benczik ekridegis, dirante, ke tia konkurenco estas necesa. En la parolo li esprimis ankaŭ sian intereson pri la reformado de la ĉina ekonomia sistemo. Li deziris, ke EPĈ konigu tion al siaj legantoj.

S-ano Jerzy Leyk proponis, ke oni tenu la lingvaj trajtojn de Esperanto. Li deziris, ke la

revuo EPĈ levu sian lingvan nivelon kaj fariĝu pli rafinita. Nia jugoslava peranto Živko Milojević rimarkigis, ke EPĈ ne ĉiam akurate atingas siajn legantojn. Koncerne la enhavon de nia revuo ili deziris legi en la revuo pli da artikoloj pri la historio kaj nuna stato de la ĉina E-movado kaj Esperantajn poemojn.


Antaŭtagmeze de la 22-a, akompanate de pekinaj esperantistoj la gastoj ekskursis al la Granda Muro.

Inter la eksterlandanoj japanaj s-anoj Takenaka-Ĝisuke kaj Miyamoto Masao estas pli-ol-70-jaraj, franca s-anino Louise Marin kaj pola s-anino Irena Szanser estas pli-ol-60-jaraj, tamen ili ekĝojis kiel gejunuloj, informiĝinte pri la ekskurso al la Granda Muro.

La aŭto kuregis sur la ŝoseo en ridoj kaj interparolado de la ĉinaj kaj eksterlandaj samideanoj. Louise Marin elprenis sian kantaron kaj ekkantis, kaj ankaŭ la aliaj ekkantis laŭ ŝia takto.

Post 2-hora kurado nia aŭto suriris la kurbe leviĝantan ŝoseon kaj post nelonge antaŭ ni aperis la Granda Muro konstruita en Ming-dinastio (1368-1644 p. K.). La loko aspektas pli impone post riparado.

Nun ni komencis grimpi la Grandan Muron. La 27-jara Ian Curzon Jackson estas la plej juna el niaj gastoj. Li kaj aliaj junuloj iris en la fronto.



*Niaj gastoj kun turistoj
ĝuas ĉinan popolan muzikon.*

Ne volontis postĝi ankaŭ la maljunuloj, inter kiuj ja estis la 81-jara Takenaka-Ĝisuke. Li estis fiera, kiel malnova peranto, kiu varbis por nia revuo pli ol mil abonantojn. Li diris, ke la ĉina nacio estas honesta kaj diligenta, pro kio li fidis ĝin.

La rundovojo sur la Granda Muro estas pavimita per brikegoj. Apogiloj ambaŭflanke ĉe parapetoj faciligas iradon. Nur ĉe kelkaj partoj la rundovojo estas mallarĝa kaj malfacila por trapaso. Tio kompreneble estas ne malfacila por la junuloj, tamen por s-ino Louise Marin la grimpado estas peniga. Malgraŭ tio ŝi senhalte atingis la kulminon kune kun la junuloj.


Pri la Granda Muro la ĉiĉerono citis ĉinan version "kiu ne atingos la Grandan Muron, ne estos bravulo". Grimpinte la Grandan Muron kaj rememorante la version, ili ĉiuj sentis sin fieraj. Kvankam iuj el ili ne atingis la kulminon, tamen ili almenaŭ atingis la muron. Ili do unu poŝt alia sin fotis tie.

Adiaŭinte la Grandan Muron, la eksterlandaj gastoj vizitis la maŭzoleon de la imperiestro Ĝu Jiĝjun, unu el la 13 maŭzoleoj de Ming-dinastio.

Vespere de tiu tago la redakcio de EPC donis bankedon por la eksterlandaj samideanoj, kiuj speciale veturis al Ĉinio por partopreni en la cele-

*Li Ŝiĝjun (maldekstre), vicĉefredaktoro de la
redakcio de EPC, dankas hungaran reprezen-
tanton pro lia donaco.*





Vicministro Lju Ĝiŝjan (dekstre) salutas la te-kunsidon.

Gratulo kaj Espero*

— Parolado de Lju Ĝiŝjan, vicministro
de la Kultura Ministerio de la
Ĉina Popola Respubliko

Hodiaŭ ni ĝoje kolektiĝas ĉi tie por celebri la 35-an datrevenon de la fondiĝo de la gazeto "El Popola Ĉinio". Permesu al mi, en la nomo de la Kultura Ministerio, esprimi koran gratulon al la kamaradoj de la redakcio de EPC.

"El Popola Ĉinio" iniciatita de Hujucz, vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso, estas unu el la plej fruaj revuoj por eksterlandaj legantoj kaj ankaŭ la plej longe eldonata kaj plej grandinflua Esperanta revuo en la historio de la ĉina Esperan-

to-movado. La fakto mem montras, ke nia registaro alte taksas la rolon de Esperanto en akcelo de la kultura interfluo, interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Antaŭ sia forpaso niaj estimataj kamarado Ĝoŭ Enlaj** kaj kamarado Ĉen Ji*** plurfoje donis personan atenton al la Esperanta laboro. En la tumultaj jaroj de 1966 ĝis 1976 kamarado Ĝoŭ Enlaj en malsano ankoraŭ instrukciis, ke koncerna fako de la Ŝtata Konsilantaro zorgu pri la Espe-

brado de la 35-a datreveno de la naskiĝo de la revuo. La ĉinaj kaj eksterlandaj samideanoj kiel intimaj familianoj foje-refoje tostis kaj pluraj ĉeestantoj improvizis paroladojn. Ĝojo kaj amikeco regis en la tuta salono.

Vespere de la 21-a, ĈEL kaj LKK de la 71-a UK donis bankedon por la eksterlandaj samideanoj kaj koncize konigis al ili la preparadon de la Pekina Kongreso.

Dum sia restado en Pekino la gastoj vizitis la Imperiestran Palacon kaj la Someran Palacon kaj kun granda respekto rigardis la restaĵon de Pre-

zidanto Maŭ Zedong. Ili ankaŭ vojaĝis al Hangĝoŭ, Suĝoŭ kaj Ŝanhajo.

En Pekino la gastoj donis al la redakcio de EPC gratulajn vortojn kaj donacojn de la koncernaj Esp-organizaĵoj.

Dum multaj jaroj la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj ĉiam sincere agis kun bela espero: por mondpaco kaj homa progreso. Hodiaŭ, celebrante la 35-an datrevenon de la naskiĝo de la revuo "El Popola Ĉinio" ni ankoraŭfoje esprimu nian volon: Same kiel la tutmondaj esperantistoj, ni kontribuos plu al niaj komuna idealo kaj afero.

ranta laboro. Kamarado Ĉen Ji persone ĉeestis Esperantan laborkunvenon kaj faris multajn gravajn proponojn pri la Esperanta eldonado. Subtenate de li EPĈ komencis eldoniĝi ĉiumonate anstataŭ en ĉiu dua monato. Tial ni diras, ke “El Popola Ĉinio” kreskas ĝuste sub la prizorgo de ĉi tiuj gvidantoj de la ŝtato.

En la pasintaj 35 jaroj la redakcio de EPĈ eldonis ankaŭ nombron da Esperantaj libroj. La gekamaradoj laborantaj en ĝi faris multajn laborojn por prezenti al la mondo atingojn de la nova Ĉinio en ekonomio kaj kulturo, la novan vivon kaj novajn morojn de la ĉina popolo, fundamentajn sciojn pri Ĉinio, kaj por akceli la interkompreniĝon kaj amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj, kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. Nun “El Popola Ĉinio” servas siajn legantojn en pli ol 80 landoj kaj regionoj kaj estas konata kiel unu el la “plej belaj Esperantaj revuoj”. Tiuj sukcesoj venis ja ne facile. Ili estas rezulto de la diligenta laborado de ĉiuj laborantoj de la redakcio de EPĈ kaj ankaŭ rezulto de la granda subteno kaj plena kunlaboro de ĉinaj esperantistoj kaj frataj unuoj.

Ankaŭ granda nombro da legantoj kaj perantoj de EPĈ, la Universala Esperanto-Asocio kaj diverslandaj Esperantaj organizoj multe kontribuis al ĝia eldonado kaj distribuado, pro tio ni ĉiam havas profundan respekton al ili.

La 35-jara historio de “El Popola Ĉinio” pruvigis, ke Esperanto estas esperplena lingvo, per kiu oni povas multe fari por akceli la scian kaj kulturen interfluan, interkompreniĝon kaj amikecon inter diverslandaj popoloj kaj defendi la mondpa-

con. Via laboro estas signifoplena kaj valora. Mi kore deziras, ke la kamaradoj de la redakcio de EPĈ pli intime kontaktiĝu kaj kunlaboru kun la diverslandaj legantoj kaj amikoj kaj faru pli grandan kontribuon al la progreso de la homaro kaj al la mondopaco!

Nun tre bona estas la situacio de nia lando en politiko kaj ekonomio. Sub la gvidado de la principo malfermi nian pardonon al fremdaj landoj kaj vigligi ekonomion enlande, ni faras plenanpleksan reformadon al diversaj entreprenoj, kun la reformado de la urba ekonomia sistemo kiel la ĉefa kaj klopodas por krei novan perspektivon. Nun diverslandaj popoloj tre deziras informiĝi pri la nova disvolviĝo kaj novaj ŝanĝoj de Ĉinio kaj ni devas kontentigi ilin en tio. Mi sincere esperas, ke la kamaradoj de EPĈ diligente laboros, sin detenos de fiero kaj malpacienco, senĉese perfektigos sin ideologie kaj laborkapable, plibonigos la revuon kaj malfermos novan perspektivon por la Esperanta eldonado.


Ankoraŭ pli grandan sukceson al “El Popola Ĉinio”!

** Tiu ĉi estas citaĵo el la parolado farita de la aŭtoro en la tekunsido por celebri la 35-jaran jubileon de EPĈ.*

*** Ĝou Enlaj (1898 — 1976) funkciis kiel ĉefministro de la ĉina registaro de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 ĝis sia morto en 1976.*

**** Ĉen Ji (1901 — 1972) estis sinsekve urbestro de Ŝanhajo, vicĉefministro kaj ministro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la ĉina registaro post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.*

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Ŝandong-provinco
2. Suĝou
3. Hangĝou
4. Ŝanhajo
5. Kantono
6. Tibeta Aŭtonoma Regiono
7. Junnan-provinco
8. Ŝenjang
9. Ili

EN ROLO DE ESPERANTO EPĈ HAVAS ANKAŬ SIAN PARTON*

de IAN CURZON JACKSON**



En la nomo de Universala Esperanto-Asocio mi kore salutas vin, gekamaradoj.

Antaŭ 35 jaroj okazis evento, kiu eventuale en tiu tempo ne ŝajnis grava. Nun, en retrospektivo, ni komprenas, ke ĝi fakte estis gravega. Ekaperis informa bulteno en Ĉinio: El Popola Ĉinio.

El modesta komenco la revuo evoluis, ĝis ĝi atingis tiun altan nivelon, kiun ni konas hodiaŭ.

Mi supozas, ke necesas tri aferoj por certigi la sukceson de gazeto. La gazeto devas esti aktuala; ĝi devas enhavi varian materialon; kaj ĝi devas havi klaran redaktan linion. EPĈ bone plenumas ĉiujn tri postulojn.

Ĉinio en la lastaj jardekoj transformiĝis politike kaj socie. Sed dank' al EPĈ la Esperanta komunumo tra la mondo estas bone informita pri la progreso de viaj programoj. Jen la aktualeco de la revuo.

Enhave, EPĈ estas bunte varia. Artikoloj ekonomiaj, sociaj, kulturaj, sciencaj; bildoj fotografiaj kaj desegnaj; fotoj koloraj kaj nigrablankaj. Tiu bunteco igis EPĈon unu el la plej popularaj Esperanto-gazetoj.

Kaj trie, la redakta linio. Nepras, ke la redakcio de gazeto havu konsciajn celojn: se la gazeto komencas drivi, la legantoj perdas intereson, abonoj forfalas. Pri tio la redakcio de EPĈ ĉiam komprenis.

Mi volas aparte gratuli vin pri tri aferoj. Unue, pri la lingva nivelo de la revuo. EPĈ estas unu el la normigaj influoj de la moderna lingvaĵo en Esperanto. Due pri la kontinueco: dum 32 el siaj 35 jaroj EPĈ aperadis absolute fidele kaj regule. (EPĈ ĉesis eldoniĝi en 1954 kaj reaperis en 1957. — Red.) Kaj trie pri la vasta distribuo de la gazeto. Dank' al la kunlaboro de viaj kolegoj de la Internacia Libroservo (Guozi Shudian), EPĈ estas legata en ĉiuj landoj, kie troviĝas signifaj nombroj da Esperantaj parolantoj.

Datreveno estas okazo rigardi malantaŭen, sed ankaŭ por rigardi antaŭen. Do kio pri la estonteco? Kion alportos la venontaj 35 jaroj?

La disvolviĝo de Esperanto en Ĉinio estas unu el la plej ekscitaj okazaĵoj de la nuna tempo. Ĉina Esperanto-Ligo jam prenis sian plene meritatan lokon kiel landa asocio de UEA, kaj, pli kaj pli, aŭdiĝos ĉinaj voĉoj en la decidofarado de tiu kupola Esperanta organizo tutmonda.

Tiurilate, la estraro de UEA petis, ke mi diru du aferojn al vi.

Unue, ke ĈEL estas unuo el la plej bone funkciantaj landaj asocioj de UEA, kun kiu ĉiam estas plezure kunlabori.

Kaj due, ni ne forgesas, ke vi invitis al Pekino la 7an Universalan Kongreson, tiel afable, tiel kuraĝe. Organizati internacian kongreson estas malfacila tasko, sed UEA kredas, ke vi havas la talentojn kaj kapablojn realigi tre memorindan kongreson. Ni kore bondeziras por viaj preparlaboroj kaj memorigas, ke UEA estas ĉiam preta por doni helpon kaj konsilojn.

Por diri miajn vortojn al fino. En la 35 jaroj de la ekzisto de El Popola Ĉinio la mondo draste ŝanĝiĝis. La simpla slogano, ke la mondo bezonas internacian lingvon, ne plu sufiĉas. En epoko, kiam iuj ŝtatoj havas la povon detrui nin ĉiujn en la daŭro de nur kelkaj horoj, ni nun scias, ke unuavice la mondo bezonas pacan kunlaboradon anstataŭ konfliktoj. Sed paco fontas nur el komprenemo, kaj oni ne komprenas popolon, se oni ne konas ĝin.

Jen la rolo de Esperanto, kaj en tiu rolo EPĈ havas ankaŭ sian parton. En mondo, kie disputoj kaj malpaco tro abundas, ni estas perantoj de kompreno kaj kunlaboro.

Mi deziras al EPĈ, kaj al nia landa asocio ĈEL, ĉian prosperon en ĝia estonta agado. Mi dankas pro la afabla invito partopreni en via datrevena festado. Kaj mi esperas, ke la venontaj

GRAVA FUNKCIO DE EPĈ

de JERZY LEYK (Pollando)



Estas por mi granda honoro povi ĉi tie saluti vin okaze de via festo, de la 35-jariĝo de "El Popola Ĉinio". La salutojn mi transdonas unue de la ĉefa Estraro de PEA kaj de la redakcia stabo de nia modesta revuo "Pola Esperantisto".

Ni venis triope al via festo el Varsovio, el la urbo kie antaŭ 98 jaroj aperis la unua libro de D-ro Zamenhof. Vi povas imagi, kiel ni ĝojas, spertante kiel lia inventaĵo disradiis tra la mondo, manifestiĝante precipe ĉi tie en Pekino per la impona lastatempa laboro de la redakcio de EPĈ kaj pluraj aliaj ĉinaj amikoj.

Okaze de la jubileo de la gazeto estas la momento retrorigardi la faritan laboron, la pasigitan vojon kaj skizi planojn por la estonteco.

Legante la gazeton, logitaj per ĝia enhavo ni apenaŭ pensas, kiom da peno, da laboro, sindonemo, oferemo de la homoj kaŝiĝas malantaŭ ĝiaj paĝoj. Nun ni dankas pro tiuj klopodoj kaj persistemo, ĉar ni scias kiom zigzagan vojon iris viaj gekolegoj por celebri la hodiaŭajn sukcesojn.

Kelkajn plej gravajn miaopinie funkciojn de EPĈ mi ŝatas nunmomente mencii.

La unuan funkcion mi nomas fenestro al Ĉinio. Ebleco, en pluraj landoj rara, konatiĝi kun riĉa ĉina civilizo, kulturo, tradicioj, moroj, kutimoj kaj nuntempo.

Tiu funkcio rekte ligiĝas kun la dua, la eduka valoro. Dank' al EPĈ la Esperanto-parolanto ricevas plian ŝancon forigi certajn stereotipojn, ŝablonajn imagojn kaj anstataŭigi ilin per novaj scioj,

novaj sentoj, pliriĉigi sin mem kaj la medion, ricevi pli da eblecoj kompari, pripensi, konstrui sian propran opinion, senti sin mondano, ne provincano.

Gravas ankaŭ la interesefikaj funkcioj. EPĈ portas esencan lingvan valoron. Ĝi helpas kontraŭstari la eŭropismon de Esperanto en la parolturnoj, priskriboj, elekto de vortoj. Praktikado de Esperanto far ĉinoj rektigas la evoluojn de Esperanto, riĉigas la lingvon sed ankaŭ helpas eviti la misvojojn kaj misuzojn.

Kvare, la stabiliga funkcio por la loka E-medio. Preskaŭ ĉiuj lokaj E-medioj ankaŭ la ĉinia — travivas periodojn de pli kaj malpli favoraj kondiĉoj. Eldonado de EPĈ ebligadis al la E-komunumo dum tiuj 35 jaroj travivi, konserviĝi, rapide kreski kaj stabiliĝi sur nova, pli alta nivelo.

Oni ne povas supertaksi la rolon de EPĈ en tiuj menciitaj funkcioj. Tamen ŝajnas al mi, ke la redakcio kaj lokaj E-medioj havas ankoraŭ grandajn intelektajn rezerveojn. Precipe en la originala E-kulturo. Al la ekspluato de tiuj rezerveoj mi ŝatus inviti kaj kuraĝigi la revuon.

Kiam mi esprimas niajn dankon kaj kontenton pro la farita laboro, permesu al mi enmanigi nunmomente la gratuldiplomon de PEA kaj "Pola Esperantisto". Akompanas ĝin memormedalo prezentanta L.L. Zamenhofon.

Mi deziras al la redakcio, ke dum la sekvaj jaroj EPĈ plu ludu sian rolon en la gazetara Esperanto-mondo.

35 jaroj alportos al via gazeto ankoraŭ pli da sukceso kaj rekono.

Salutojn kaj multan dankon.


* Tiu ĉi artikolo kaj jenaj kvar artikoloj estas salutparoloj de kvin ĉeestantoj dum la teo-kunsido

aranĝita por celebri la 35-an datrevenon de la fondiĝo de El Popola Ĉinio. La titoloj estas donitaj de redaktoro.

** S-ro Ian Curzon Jackson estas reprezentanto de UEA kaj prezidanto de TEJO, komitatano de UEA.

LA SOCIA PRESTIĜO DE ESPERANTO EN ĈINIO

de VILMOS BENCZIK (Hungario)



*S-ro Vilmos Benczik kaj lia
edzino s-ino Maria Benczik*

Mi venis el fora, malgranda lando, kiu laŭ la nombro de la loĝantaro kaj ankaŭ laŭ sia teritorio estas centono de Ĉinio. Por ni hungaroj, kiuj estas lingve izolitaj en Eŭropo, Esperanto estas tre grava rimedo por havi internaciajn kontaktojn. Sed Esperanto povas funkcii en tiu pera rolo nur se ankaŭ grandaj landoj — kiel Ĉinio — aplikas ĝin en sia internacia agado. La revuo *El Popola Ĉinio* estas por ni hungaraj esperantistoj kvazaŭ fenestro tra kiu ni povas enrigardi en la ĉinan vivon. Instigas nin enrigardi tra tiu fenestro ne nur la simpatia scivolo — tio estas ankaŭ nia intereso, ja gravas por ni scii, kiel konstruas por si la estonton lando, kie vivas kvarono de la tutmonda loĝantaro. Ni utiligas la artikolojn aperantajn en EPC ankaŭ por informi pri Ĉinio la nacilingvan publikon. Ofte ni aperigas tradukojn de tiaj artikoloj en grandaj nacilingvaj gazetoj kies eldonkvanto superas centmilon. Tiuj tradukoj estas kvazaŭ daŭrigo de tiu kultura tradicio, per kiu efektiviĝis ĉina traduko de pluraj ĉefverkoj de la hungara literaturo pere de Esperanto.

Mi estas ĉi tie du tagojn nun, sed mi jam spertis, ke ĉinaj esperantistoj deziras ricevi antaŭ ĉio kritikojn pri sia laboro. La atingajoj de Esperanto en Ĉinio estas tiel grandaj, ke fakte ni povas ne kritiki ilin, sed lerni de ili, precipe, kio koncernas la socian prestiĝon de la Internacia Lingvo en Ĉinio. Pri tiu prestiĝo elokvente atestas la granda nombro de la altrangaj reprezentantoj de la ĉina politika, socia kaj kultura vivo, kiuj ĉeestas tiun ĉi kunvenon.

EPC havas memorindan rolon ankaŭ en mia propra esperantista vivo. Antaŭ 25 jaroj, kiam kiel juna gimnaziano mi eklernis Esperanton, EPC estis la unua Esperanta revuo, kiun mi abonis, ne lastvice pro tio, ke ĝia abonprezo estis pagebla ankaŭ el la poŝmono de neriĉa knabo.

En la nomo de la Estraro de Hungara Esperanto-Asocio, en la nomo de la Redakcio de Hungara Vivo kaj en la nomo de ĉiuj hungaraj esperantistoj mi deziras al via gazeto sukcesojn kaj prosperon dum almenaŭ pliaj 35 jaroj.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 62-jara eksveteristo dez. kor. kun samideanoj en norda Eŭropo pri meteorologio, historio, ĉiutaga vivo ktp. S-ro Walter Klag, Silbergasse 21/7, A-1190 Wien, Aŭstrio.

* 36-jara profesoro dez. kor. kun samideanoj ekster Eŭropo pri Esperanto, naturscienco, historio, ĉiutaga vivo ktp. S-ro Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien, Aŭstrio.

* Ni salutas gastigantojn, novamiĝojn konitajn dum eŭropa vojaĝado. Gekorespondantoj: Daŭrigos decembre korespondadon. Gesinjoroj Tarducci, Argentino.

* 17-jara fraŭlino Valdelice de Oliveira deziras korespondi kun alilandaj seriozaj samideanoj por estonta geedziĝo. Caixa Postal 97, BR-78500 Rondopolis-MT, Brazilo.



KREI INTERKOMPRENON KAJ AMIKECON

de NAGASE YOSHIKATSU (Japanio)

Okaze de la 35-jara jubileo de la fondiĝo de "El Popola Ĉinio", en la nomo de la japana esperantistaro mi esprimas la plej sinceran saluton kaj gratulon al ĉiuj koncernantoj de la redakcio, kiuj pacience kaj senlace laboras por plibonigi la enhavon kaj la aspekton de la gazeto.

De antaŭ multaj jaroj mi abonas EPĈ kaj povas vidi rimarkindan pliboniĝon je diversaj punktoj pri la gazeto, precipe dum la lastaj jaroj. Kaj ĝi nun estas unu el la plej enhavoriĉaj kaj bel-

aspektaj gazetoj en la tuta Esperantio.

EPĈ liveras valorajn kaj interesajn informojn pri Ĉinio kaj samtempe ĉiam klopodas krei interkomprenon kaj amikajn rilatojn inter la legantoj. Ĝia redakcio vere meritas ricevi profundan dankon kaj grandan aplaŭdon ne nur de la amika legantaro sed ankaŭ de la tuta esperantistaro.

Mi elkore deziras pli da sukceso kaj prospero al la ŝatata gazeto "El Popola Ĉinio" en la estonteco.



PER "EPĈ" NI SCIAS ĜUSTE ĈINION

de W. R. Harmon (Usono)

Unu el la problemoj de homo, kiu devas alparoli grandan grupon, kiu sekvas kvin aliajn tre bonajn parolantojn, estas kion diri. Ili jam diris al vi multon, kion mi mem diris, gratulojn certe. Sed krom gratuloj mi devas esprimi mian grandan ĝojon esti inter grupo, kiu agnoskas tiel konkrete la valoron de la internacia lingvo.

Mi venas el lando kiu estas granda kaj tie esperantistoj malmultas, kie Esperanto plejparte estas teorio al la aliaj civitanoj de la lando. Estante tie ĉi kaj vidante inter vi la gravajn homojn kiuj gvidas la novan Ĉinion, mi certe povas konstati al miaj komunaj amikoj neesperantistaj en Usono, ke Esperanto ne estas teorio en Ĉinio, ke ĝi estas praktika afero. Mi revenos hejmen al Usono kaj mi diros al miaj esperantistaj geamikoj,

ke ili absolute devas veni al Pekino en 1986, ĉar eble ili ne kredus, kion mi diras al ili.

Mi volas almeti, ke persone mi legis "El Popola Ĉinio" dum multaj jaroj kaj el tiu gazeto mi lernis multe pri tiu ĉi vasta kaj renoviĝanta nacio. Al tro multaj usonanoj Ĉinio estas granda mistero. Per Esperanto, per "El Popola Ĉinio", per la publikaĵoj de Guoji Shudian, per Esperanto-Sekcio almenaŭ ni esperantistoj en Usono scias ĝuste, detale kaj bone, kio okazas en via nacio.

Finante mi volas gratuli al ĉiuj, kiuj tiel bone kunlaboras tie ĉi por prezenti Ĉinion honeste kaj sincere al la mondo, kaj mi esperas, ke vi daŭros en tiu klopodo multe pli ol tridek kvin jarojn kaj certe mi esperas, ke ni ĉiuj vivos dum tiuj jaroj en paco kaj amikeco.

GRATULAJ VORTOJ DE POLAJ KAJ USONAJ ESP-ISTOJ

La redakcio de „*Popla Esperantisto*”
Popla Esperanto-Asocio

gratulas
 al la meritplena, mondkonata,
 unu el la plej koaltas kaj valoraj revuoj

„*El Popola Ĉinio*”
 la 35-jaran jubileon

kaj deziras al ĝia oferema kaj sindona
 redakcio kaj kunlaborantaro plurajn
 novajn sukcesojn en la esperanta laboro

Varsouto 1985

*John Leitch
 ĉefo de redakcio
 ĉefo de redakcio
 ĉefo de redakcio*

OFICIALA DEKLARO

Ĉi konsidere ke EL POPOLA ĈINIO dum 35 jaroj fidele servas al la tutmonda Esperantistaro, informante pri la atingoj de la Popola Respubliko de Ĉinio, pri ties kulturo kaj popoloj;

Ĉi konsidere ke en 1985 EL POPOLA ĈINIO celebras sian 35-jaran jubileon;

Ĉi ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO esprimas siajn plej sincerajn dankojn, gratulojn, kaj bondezirojn al la funkciuloj, amikoj, kaj redakcio de EL POPOLA ĈINIO pro iliaj gravaj kontribuoj al la Esperanto-Movado en Usono kaj tra la tuta mondo.

Duncan Charters
 Duncan Charters
 Prezidanto de ELNA

Donald Harlow
 Donald Harlow
 Sekretario de ELNA

Gregory V. Wasson
 Gregory V. Wasson
 Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA


William R. Harmon
 William R. Harmon
 Komisiito por Supergvidado de la CO

Gratulaj vortoj de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

Gratulaj vortoj de la redakcio de „*Popla Esperantisto*” kaj la *Popla Esperanto-Asocio*

Gratulaj vortoj de la San Franciska Esperanta Regiona Organizo

Gratulaj vortoj de la Berklija Esperanto-Ligo



Okaze de la 35-jara datreveno de la fondiĝo de „*El Popola Ĉinio*”, la anoj de la Berklija Esperanto-Ligo salutas la eldonistojn.

Ni deziras esprimi mian fortan senton, ke via bonega gazeto kunigas la Esperantan movadon per altnivela raportado, interesegaj artikoloj, kaj belaj fotografiaĵoj. Ĉiu el ĉi tiuj ankaŭ kreas en la animo de la leganto neforgeseblajn pentraĵojn pri la ĉina popolo, lando, vivo, kaj kulturo.

Gratulojn kaj dankojn ni sendas pro jam sukcesaj atingoj, kune kun korsentataj kaj konstantaj esperoj por brillumanta estonteco.

Donald H. Coleman Prezidanto

David Ward Peltier Viceprezidanto

Karen P. Mason Kasisto

H. D. Anderson Sekretario

Kiu Estas la Mastro de la Kabano?

Foje mi pentris pejzaĝojn en montaro de la provinco Junnan. Atentante nur la pentradon, mi eĉ ne rimarkis, ke la suno baldaŭ subiros. Mia kolego estis iom maltrankvila, timante, ke vespere ni ne atingos nian tranoktejon.

Pli kaj pli malheliĝis. Ni rapide reiris.

“Jen domo!” mia amiko montris kabanon en arbaro antaŭ ni.

Ni alproksimiĝis al la kabano kaj rimarkis du ideogramojn sur ĝia pordo: “Bonvolu eniri!”

Enirinte en la kabanon ni trovis akvon, rizon, salon kaj kap-sikon. Sur la muro vidiĝis jenaj vortoj: “Bonvolu mem prepari manĝaĵon!”

Demetinte la kunportaĵojn, ni komencis hejti fornon kaj prepari manĝaĵon. Tamen ni ne komprenis, kien iris la mastro?

Tiam eniris maljunulo kun ĉaspafilo sur la dekstra ŝultro kaj grensako sur la maldekstra.

“Ho, la mastro revenis!” mi pensis kaj tuj stariĝis, dirante al li: “Multan dankon! Ni estas preterpasantoj. Pro malfrueco, ni ne povas ne ĝeni vin. . .”

“Ne, mi ne estas la mastro,” la maljunulo kapneis. “Ankaŭ mi estas preterpasanto. Mi, jaŭ-o, loĝas trans la monto. Iutage en la lasta monato mi ĉasis ĉi tie. Pro malfrueco mi manĝis kaj tranoktis en tiu ĉi kabano. En la sek-

vanta mateno, antaŭ foriro mi restigis ruĝan turbanon kun stariĝita plumo, por sciigi la mastron, ke jaŭ-o iam tranoktis ĉi tie. Hodiaŭ mi alportis rizon al la mastro kiel kompenson.”

“Kiu estas la mastro de la domo?”

Ekfuminte, la maljunulo malrapide diris: “Pri tio mi demandis multajn homojn. Oni diris, ke la kabano servas speciale por pasantoj. La mastro estas hania knabino nomata Lihŭa (pirarba floro).”

Lihŭa, kiel bela nomo!

En la sekvanta mateno, mi balais kaj ordigis la kabanon. Mi ankaŭ pentris tiun neforgeseblan kabanon.

Tuj antaŭ nia forlaso, subite ni trovis, ke grupo da knabinoj venis al ni, babilante kaj ridante. La knabino iranta en la unua vico dorseportis bambutubon plenan de akvo.

“Dankon, mia kara knabino!” la maljunulo renkonte iris al ŝi kaj diris: “Vi konstruis la kabanon por preterpasantoj. . .”

“Ne! Ne min danku!” la knabino ekridis. “Mi ne estas Lihŭa. Tio estas la nomo de mia pliĝa fratino. Ŝi jam edziniĝis kaj nun loĝas trans la monto.”

Sendube, la laboron jam transprenis tiuj knabinoj. Kiel bonaj knabinoj!

Ili estas tiel belaj kaj amindaj, kiel blankaj floroj de pirarbo.



Ilustraĵo de ŬANG DONGHAJ

Granda Humanisma Faro

—Pri rara dokumento en la historio de la Esperanto-movado

Post sia fondiĝo en 1908 la Universala Esperanto-Asocio faris grandan kontribuon por elimini la lingvan baron inter diversaj nacioj, akceli la internacian kulturen interŝanĝon kaj la amikecon de la diverslandaj popoloj kaj defendi la pacon kaj la progresan aferon de la homaro. En sia fama verko *Historio de la Lingvo Esperanto* (1887 — 1927) eminenta svisa esperantisto Edmond Privat (1889 — 1962) faris detalan priskribon pri tio.

Ĉi-sube mi volus konigi raran dokumenton de la Universala Esperanto-Asocio en la Unua Mondmilito.

Somere de 1914, kiam subite eksplodis la Unua Mondmilito, la tuta Eŭropo involviĝis en ĥaosan interbuĉadon kaj falis en la abismon de katastrofo. Multaj familioj estis disigitaj kaj la homoj multe suferis. En tiu forta tumulto de la socio, la Universala Esperanto-Asocio gvidata de s-ro Hector Hodler dediĉis sin kiel antaŭe al la paca kaj humanisma afero, transsendis privatajn leterojn al disigitaj familioj de la landoj antagonismaj dum la milito kaj serĉis parencojn por ili.

En septembro de 1914 la Centra Oficejo de la Universala Esperanto-Asocio, kiu sidis en Ĝenevo de Svisio, dissendis anoncon al siaj delegitoj en diversaj landoj. Ĝi estis tradukita en pli ol 30 lingvojn kaj aperis en ĉ. cent ĵurnaloj kaj gazetoj. Ĝi legiĝis: Ĉar la militago okazis preskaŭ subite, multaj personoj troviĝas surprizataj en la malamikaj landoj kaj ne plu havas la eblon

korespondi kun siaj parencoj kaj amikoj. Por laŭeble helpi ilin, la oficejo de UEA, sidanta en Ĝenevo, ĵus informis siajn delegitojn en la malamikaj landoj, ke ĝi volonte servos kiel perilo por la interŝanĝado de privataj korespondaĵoj inter la malamikaj landoj. La leteroj estas ricevataj ĉe la Ĝeneva Oficejo, de kie ili estas transdonataj al la adresatoj, se bezone post traduko. Estas akceptataj nur la nefermitaj korespondaĵoj, havantaj absolute nenan politikan aŭ militistan karakteron. La personoj, kiuj deziras uzi tiun servon, nun en plena funkciado, estas petataj sendi ĉiujn leterojn kun du internaciaj respondkuponoj, al UEA, 10, rue de la Bourse, Genève, Svislando." (*Enciklopedio de Esperanto*, volumo II, p. 547). Post la aperigo de la anonco leteroj petantaj helpon amase venis. En la kvar jaroj de 1914—1918 oni ricevis sume ĉ. 200 000 leterojn,

po 200—300 ĉiutage. Por faciligi traktadon la oficejo dividis la leterojn en dek kategoriojn, nome: 1. simpla transsendo; 2. specialaj servoj; 3. monsendo; 4. militistoj; 5. civilkaptitoj; 6. rehejmigado de civiluloj en milit-regionoj; 7. militkaptitoj kaj rilatoj kun la respektivaj organizaĵoj; 8. rilatoj kun ruĝkrucaj organizaĵoj; 9. Ruĝa Kruco, Ĝenevo; 10. variaĵoj.

Lastatempe mi ricevis poŝtkarton, kiun sendis siatempe la oficejo de UEA en Ĝenevo al petanto, kiu serĉis sian familianon. Ĝi estas rara dokumento en la historio de la Esperanto-movado. La poŝtkarto en formato de 13.8 × 8.7 cm. estas germanlingve presita, kun unu svisa verda poŝtmarko kaj la stampo datita la 22-an de nov. 1915.

Sur la fronto:

(Sendinto)

Universala Esperanto-Asocio

Fronto de la poŝtkarto (reproduktio)



10, Börsenstrasse, GENF
(Schweiz)

Leterinterŝanĝa Stacio por
la Militantaj Landoj (ad-
resato)

Tine Findt
Hauff-str. 8/1
Ulm o/D
Germanio

Sur la dorsflanko:

Ĝenevo, dato de poŝtstampo
Ni jam ricevis vian leteron.

I. Ni jam sendis leteron laŭ
la donita adreso. Se ni ricevos
la respondon, ni tuj transsendos
ĝin al vi.

II. La trafiko estas inter-
rompita inter la militokupa re-
giono kaj germana kolonio, tial
ni transsendos vian leteron laŭ
nia eblo.

III. Ni jam transdiris vian
postulon al la serĉaj oficejoj de
militkaptitoj en Ĝenevo, S. Pe-
terburgo, Kopenhago kaj Nico.
Ili faros necesan enketon kaj
sciigos vin pri la rezulto.

INTERNACIA ESPE- RANTO-BUROO

Ni kore dankos vin, se vi do-
nos donacon al ni.

Dorsflanko de la poŝtkarto (reproduktio)

Genf, Datum des Poststempels.

P.P.

Wir bestätigen den Empfang Ihres Briefes.

I. — Wir versandten Ihren Brief — schrieben — an die bezeichnete
Adresse. Antwort werden wir sofort nach Eingang übermitteln.

II. — Der Verkehr mit militärisch besetzten Gebieten und den deutschen
Kolonien ist unterbrochen; wir übersandten den Brief nach den uns derzeit zu
Gebote stehenden Mitteln, d. h. ohne Garantie.

III. — Wir übergaben Ihre Anfrage der Kriegsgefangenen. Ermittlungs-
stelle in — Genf — ~~St. Petersburg~~ — ~~Kopenhagen~~ — ~~Nisch~~ —, welches sich um die
nötigen Ermittlungen bemüht, und Sie von dem Resultat in Kenntnis setzen wird.

INTERNATIONALES ESPERANTO BUREAU.

Gaben zu Gunsten unseres Bureaus werden dankbar entgegen genommen.

KORESPONDI DEZIRAS

(I, II kaj S. Peterburgo, Ko-
penhago kaj Nico de III en la
originalo estis forstrekitaj)

La poŝtkarto, servanta kiel
ponto inter militkaptito kaj liaj
familianoj alportis konsolon kaj,
pli grave, esperon al la korkre-
va adresato, kaj samtempe ĝi
montris noblan humanismon de
la Universala Esperanto-Asocio.

Mia amiko Rudolf Burmeister,
redaktoro de La Verda Lupeo/
Fenikso organo de la Esperanto-
Ligo Filatelista — Amika Rondo
de Esperantaĵo-Kolektantoj, opi-
nias, ke ĝi estas “tre rara doku-
mento pri la agado de UEA dum
la milito en 1914 — 1918.” Li
diris: “Unufoje mi vidis tiun
karton pere de via kopio. Do,
tre rara. . . Vi posedas maloftan
raraĵon, kiun eĉ ne posedas niaj
klubanoj.”

1986 estos la jaro de interna-
cia paco. UEA jam decidis oka-
zigi la 71-an UK en Pekino en tiu
jaro. Hodiaŭ ni rememoras la
grandan humanisman faron de la
Universala Esperanto-Asocio, kio
helpos nin pli profunde kompre-
ni la kontribuon de la Universala
Esperanto-Asocio, ami Esperan-
ton kaj akcelos la Esperanto-
movadon en Ĉinio.

* Leopold Edit, Gheorgheni, Cart.
Florilor, Harghita, BL.7. SC B
ap 39 et 4. 4200, Rumanio,
deziras korespondi tutmonde pri
ĉiuj temoj.

* Mi petas helpon el geesp-istoj,
precipe kuracistoj el la tuta
mondo. Mia 9-monata filino
naskiĝis kun 2-kilograma benigna
glutea tumor, poste ĝi fari-
ĝis maligna kaj ŝi estas operaci-
ta, sed laŭ kuracistoj, ŝi mortos
eble baldaŭ. Mi konfidis je vi
ĉiuj kaj atendas viajn leterojn.
Adreso: S-ro Angel Arguillos L.,
Apartado 354, 29080-Malaga,
Hispanio.

* Mi deziras korespondi kun ĉina
esp-isto, laŭeble fervojisto.
Herbert Kinzel, DDR 7270
Delitzsch, Bitterfelder Str. 91.

* 14j. lernanto Rerie Griese, DDR-
2723 Warin, Seelick 6, Psf.
964, kol. bk., pm. kaj dez. kor.
tutmonde.


* 18j. lernantino Dako Elizabeto,
Str. N-Balcescu Nr. 92, Ditrau,
Harghita 4214, Rumanio, dez.
kor. tutmonde.

* Mi deziras korespondi kun ge-
amikoj pri turismo kaj vojaĝo,
Jrena Lecka, Radom 26-600, ul.
Zawadzkiego 2 m87, Pollando.

* Vladislav Joviĉ (veterinaro),
Svetozara Markoviĉa 20, 18000
Niš, Jugoslavio, deziras kores-
pondi kaj interŝanĝi b.k. tut-
monde.

* 14j. f-ino Emma Lundgren ŝatas
muzikon, sporton kaj korespon-
don, kaj kolektas poŝtkartojn,
Soldatvagen 9, S-18600 Vallen-
tuna, Svedio.

* Kerim Adina, Blok LII. Sk. C.
Apt. 60, Tomis 3, Konstanca,
Rumanio, deziras korespondi
kun fervojistoj el Ĉinio kaj tut-
mondo pri kulturo, turismo kaj
kutimoj de popoloj.



S-ro Tibor Sekelj

TIBOR SEKELJ:

La Naskiĝo de Neologismoj

Kun agrabla surprizo mi legis la simpatiajn liniojn dediĉitajn de sinjoro LAŬLUM al la "DU BUKEDOJ" ricevitaĵoj el miaj manoj (EPC, 1985/1 p. 28-30). Ne estas mia intenco respondi — nek danki la laŭdojn nek rifuzi la mallaŭdojn — ĉar kuraĝe eldirita opinio de kritikisto estas ĉiam laŭdinda. Mi nur uzas tiun okazon kiel pretekston por prilumigi la kreadon de neologismoj, kiel mi tion komprenas.

Dum miaj multjaraj vojaĝoj kaj instruado de Esperanto en ĉiuj kontinentoj, mi ofte sentis embarason pro la fakto, ke nia lingvo prenas plejparton de siaj vortoj el la eŭropaj lingvoj. Por esprimi iun tre simplan, ĉiutagan nocion de alia medio, mi devis foje kunmeti longan vorton, kiu en multaj kazoj estis nepreciza kaj ridinda por ĝiaj uzantoj.

Tiel naskiĝis la ideo ke, se ni deziras ke Esperanto disvastiĝu ankaŭ ekster Eŭropo, se nia lingvo celas esti esprimilo de ĉiuj homoj de la mondo, ke ĝi fariĝu vere internacia lingvo, ĝi nepre devas esti pliriĉigita per certa kvanto da novaj vortoj devenantaj el ekstereŭropaj lingvoj. Ne temas, kompreneble, pri tio, ke iu sidu kaj elpensadu vortojn aŭ transskribu el vortaroj amason da

novaj vortoj, iajn ajn vortojn, kondiĉe ke ili devnu el ekstereŭropaj lingvoj. Ne. La novaj vortoj devas naskiĝi el la neceso mem, do devas esti tiaj vortoj kies bezono la neeŭropa parolanto, la verkanto aŭ tradukanto pri neeŭropaj temoj aŭ medioj arde sentas. La kreado de novaj vortoj ne estas filologia aŭ vortara ludo, sed serĉado de esprimo ege bezonata, de esprimo kiu kaŝita nin atendas, ĉu en la fundo de nia memoro, ĉu en la paĝo de iu libro aŭ fine en iu vortaro. Do, ĉiu vorto devas respondi al nepra bezono. Alivorte, ni ne devas la ekzistantan vorton "mano" anstataŭigi per ĝia ekvivalento en sŭahilia aŭ malaja, aŭ eĉ aldoni tiujn por "riĉigi" E-on per novaj sinonimoj — ekstereŭropaj. Tio estus nur nenecesa balasto. Nia celo devas esti enkonduki tiajn vortojn kiujn la plivastigo de la Esperanta kulturo, kaj de niaj horizontoj ĝenerale, postulas. Do, unuavice temas pri vortoj por specifaj, neeŭropaj nocioj, kaj due pri nocioj ĝeneralaj, tutmondaj, por kiuj Esperanto ne posedas precizan vorton. Anstataŭ preni tian esprimon el iu eŭropa lingvo — ni prenu ĝin el ekstereŭropa.

Farante tion, kompreneble, oni ne "transprenos" vorton el alia lingvo imitante la sonojn, nek oni klopodos ke la vorto retenu ekzakte la originalan sencon. El la fonto ekzistanta oni "kreas" novan vorton, taŭgan por internacia uzo, kaj forme kaj enhave.

Por tion ilustru, ni rememoru la ekeston de la vorto "edzo". Zamenhof prenis la germanan vorton "Princessin" — princino aŭ princedzino. Ĝia unua parto signifas princon, la fina "in" signifas inekson (el kiu devenas la E-a sufikso -in), kaj la meza "ess" ne havas sencon en la germana, sed estas unu el la inaj sufiksoj en la franca lingvo. Zamenhof malatentis tiun hibridcon de "essin" kaj alprenis ĝin, ŝanĝante ĝin al "edzin" (neimagebla en la germana), kaj donis al ĝi sencon de "edzino", por derivi el ĝi la viran formon. Do, ekzemplo de tute neortodoksa vortfarado, kiu ŝokus, eĉ povus indigni Germanon kiu la unuan fojon renkontiĝas kun tia "kripligo" de germana vortero laŭ elparolo, formo kaj senco. Tamen, la etimologio de la vorto restas nur kiel historia kuriozaĵo kaj postrestas ĝia uzeblo kaj taŭga adaptiĝo al la rolo al ĝi destinita en la IL.

Laŭlum nin avertas ke la vorto "maozio" en mia kolekto "Elpafu la Sagon", kaj difinita de mi kiel "larĝa konusforma ĉapelo el pajlo, palmfolioj aŭ bambuo" estas nenecesa, kaj li demandas ĉu la formoj pajlĉapelo aŭ bambuĉapelo kaj palmfolia ĉapelo ne taŭgus por esprimi la nocion. "Maozio (maŭzi) — li daŭrigas — en la ĉina lingvo signifas kapveston kaj ĝi ne povas preni al si la signifon de aliaj vortoj *caomao* (t.e. pajlĉapelo) kaj *douli* (t.e. bambua ĉapelo)". Tiun ĉi kazon

mi citas ĉar ĝi estas tipa por la miskompreno en la kreado de novaj vortoj: ne *transpreno*, sed *adapto* laŭ formo kaj senco, kiam necese aŭ konvene. Ekzemple se iu neorientano legas la vorton "pajloĉapelo", en lia imago aperos plurspecaj pajloĉapeloj, sed certe ne larĝa konusforma, uzata en kamparanaj medioj de orienta kaj sudorienta Azio. Kaj por la alilanda leganto ne estas interese ĉu ĝi estas farita el pajlo, palmfolio aŭ bambuo; la formo plene identigas la objekton. Ĝuste tiun objekton, kiun ĉiuj konas, sed mankis por ĝi vorto.

S-ro Laŭlum konsideras eĉ pli dubindajn la vortojn *ĝanpino* laŭ ELS (Elpafu la Sagon), "valoro, prezo ne eldirebla per mono" kaj *svejalti*, laŭ ELS "malrapide, heziteme iri pro timo aŭ singardo" Tiuj du konceptoj estis necesaj en E., ĉar ion similan mi ne trovis, kaj mi bezonis ilin por fidele traduki la ideojn de la tradukota originalo.

Mi bedaŭras ke la recenzanto de mia verko ne trovis ion similan en sia vorttrezoro. Tamen la vorto 品 (giǎngpin) signifas en la hana lingvo *premio, distingo, rekompenco*, do ion tre proksiman al la esperantigita, kaj ankaŭ la elparolo malmulte diferencas. "La silaboj *sve* kaj *jal* estas fremdaj al la hana lingvo", diras Laŭlum. Tion ni sendube devas kredi al li. Tamen, eble li trovos en sia memoro — aŭ vortaro — la iom nemodernan vorton 攷 (sūei) kun la signifo "malrapide iri; ĝenata antaŭeniro". La dua parto de la vorto estas simpla aldonajo kiun mi trovis konvena por ke iom komplika nocio ne estu vorte tro simpla. Eble en tio mi ne pravus, kaj la uzo devos tion konfirmi aŭ forĵeti.

La novaj vortoj, el kiu ajn lin-

gvo prenitaj (aŭ derivitaj), kompreneble, estas destinitaj al ĝenerala uzo, ne nur por unu regiono. Tion mi praktikas jam en la menciita libro. Ekz. la maori-devena "toao" — plenaĝa, plenforta viro ĉiam preta por batalo — ekzistas ĉe multaj naturpopoloj, kaj mi uzas la saman vorton por poemoj el almenaŭ kvin regionoj en diversaj kontinentoj.

Estas dezirinde ke tiuj, kiuj verkas aŭ tradukas verkojn pri ekstereŭropaj temoj, konantoj de la medio kaj lingvoj, klopodu enkonduki neologismojn neeŭropdevenajn, sed ĉiam kun la necesa modero kaj singardemo, neforgesante ke ĉiu nova vorto estos submetita al la ekzameno de legantoj, de fakuloj, kaj super ĉio de generacioj de legantoj.

ABONTARIFO DE EPĈ

(Ekvalidas de 1-a de Oktobro)

Lando	Valuto	1 jaroj	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugalio	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00

**MEMORE AL ESPERANTAJ
MARTIROJ**

En aprilo de 1985, la Akademio de Sociaj Sciencoj de Siĉŭan-provinco eldonis la libron "Ripozu Trankvile, Herooj" por memori pri Eltunko kaj Jang Fuĉen, firmaj revoluciuloj kaj esperantistoj.

Eltunko brave sin ĵetis al la batalo por liberigi la ĉinan nacion kaj sin okupis pri propagando de Esperanto. Li faris grandan kontribuon al Esperanto per funkciigo de lernejo kaj eldonado de gazetoj. La 6-an de decembro 1949, antaŭvespere de la liberiĝo de Siĉŭan-provinco, li estis mortigita de la reacia registaro.

Jang Fuĉen, kiu amas Esperanton kaj progresajn librojn, multe helpis Eltunkon en la laboro kaj estis mortigita samtempe kun Eltunko.

La libro prezentas la vivon de la martiroj, la portreton de Eltunko, liajn aŭtografajn kaj fotojn de la gazetoj redaktitaj de li, kiaj "Verda Folio", "Lingva Disaŭdigo", "Ĉinio en Karikatur".

**FORPASIS VETERANA
ESPERANTISTO ĈEN
ĜAŬJING**

La 23-an de majo Ĉen Ĝaŭjing forpasis pro longa malsano, en la aĝo de 85 jaroj. En 1920 li eklernis Esperanton, poste li aliĝis al la Ŝanhaja Esperanto-Asocio kaj fariĝis ĝia aktivulo. Li partoprenis en redaktado de la gazeto "Verda Lumo", la organo de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, kaj estis instruisto de la Ŝanhaja Koresponda Esperanto-Lernejo. De 1928 ĝis 1934 li estis peranto de UEA en Ŝanhajo. En la lastaj jaroj, grandaĝa kaj malsana, li ankoraŭ tre zorgis pri la E-movado en kaj eksterlanda, aktive parto-



S-ro Ĉen Ĝaŭjing

prenis en aktivado aranĝita de la Pekina Esperanto-Asocio kaj verkis artikolojn por la redakcio de EPC. En la dekoj da jaroj li faris multajn kontribuojn al la ĉina E-movado. Lia forpaso estas granda perdo por la ĉina E-movado. Li vivos por eterne en la koro de la ĉinaj esperantistoj.

E-MOVADO EN LŬOJANG

Ĉi-jare, la E-movado havas novan progreson en la urbo Lŭojang de Henan-provinco. En la lastaj tagoj de marto, pli ol 100 personoj lernas en la kursoj elementa, mezgrada kaj parola funkciigataj de la Lŭojang-a Esperanto-Asocio.

La 11-an de aprilo, fondiĝis Esperanto-instituto en la Lŭojang-a Porinstruista Kolegio, kies vicrektoro Ĝang Ŝaŭgaj estas ĝia honora prezidanto. Li diris en la fondkunveno, ke oni devas mobi-

lizi fremdlingvajn instruistojn lerni Esperanton kaj la kolegio intencas funkciigi nedevigan Esperanto-lectionon.

La 21-an de aprilo, fondiĝis Esperanto-instituto ankaŭ en la Lŭojang-a Konstru-materiala Kolegio. Nun, la instituto havas pli ol 140 membrojn. Li Ĝuobaŭ, rektoro de la kolegio, estas ĝia honora prezidanto.

Nuntempe, en Lŭojang mankas Esperantaj lernolibroj. Dufoje librejo vendis la lernolibron "Esperanta Kurso", sed tio ankoraŭ ne kontentigis la bezonon. Studentoj lernis Esperanton kun granda entuziasmo. La Esperanto-Asocio de la Lŭojang-a Politeknika Instituto kaj Lŭojang-a Universitato estas en prepara fondado.

**ESPERANTA LERNEJO EN
ĈENĜDU**

La 19-an de marto ĉi-jare, ekfunkciis la Esperanta Lernejo en Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉŭan-provinco. La lernejo invitis Bakin, faman verkiston kaj vicprezidanton de ĈEL, Liŭ Hongkang, veteranan esperantiston, kaj profesoron Lu Ĝjanbo kiel siajn konsilantojn. La lernejo funkciigas kursojn elementan, parolan kaj korespondan. Krome, ĝi funkciigas Esperanto-kurson por elementaj lernejoj, kunlabore kun la Njanfengŝjang-a Elementa Lernejo de Ĉengdu.

En la urbodomo montrataj 400 pentraĵoj de infanoj el 30 landoj



Raportis la informon la ĵurnalo "Siĉuan ĵibaŭ", Siĉuan-a Televido, Radiostacioj de Siĉuan kaj Ĉengdu.

VENONTJARA ARANĜO DE IFER

La Organiza Komitato de "Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo" (IFER) decidis la okazigon de IFER inter la 14-a kaj 16-a de marto 1986 kun la ĉeftemo "Leipzig — urbo de la Laborista Esperanto-Movado".

La organizantoj bonvenigos interesitajn esperantistojn el la tuta mondo en la foira urbo Leipzig (GDR). Ĉi-somere aperos bulteno, pri temaro, programaro kaj kondiĉoj de la partopreno. Tiu ĉi informilo estos senpage havebla ekde la somero de la kuranta jaro ĉe: ORGANIZA KOMITATO DE IFER '86, Bezirksleitung des Kulturbundes der DDR, DDR-7010 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Strasse 115.

SPECIALA POŝTKARTO KAJ GLUMARKOJ

Lastatempe ni ricevis specialan poŝtkarton, kiun eldonis la Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE) okaze de celebrado de sia duobla jubileo: 60 jaroj de Esperanto-movado inter jugoslavia fervojistaro kaj 30 jaroj de JAFE. Venontjare ili organizos la 38-an kongreson de

Angulo de ĉinaj presaĵoj



IFEF en la urbo Skopje. Por tio eldoniĝis glumarkoj.

LA 25-A AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

Aŭstralio — granda insulo inter la Pacifika kaj Hindia Oceanoj bonvenigos vin al la 25-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso de la 4-a ĝis la 11-a de januaro 1986 en Perth. La ĉeesto de esperantistoj el aliaj landoj interesos aŭtoritatulojn en la fakoj de informado, politiko kaj edukado. Faru demandojn al la Aŭstralia Esperanto-Asocio.



Glumarko por la 38-a Kongreso de IFEF

ESPERANTO INTER JUGOSLAVIA FERVOJISTARO — ESPERANTO NA JŽ

1925 — 1955 — 1985



LJUBLJANA, 13. IV 1985.



Poŝtkarto eldonita de la Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj okaze de ĝia duobla jubileo

LA 3-A ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 15-a ĝis la 18-a de aŭgusto ĉi-jare okazos en Seville la 3-a Andaluzia Kongreso de Esperanto organizita de la Andaluzia Esperanto Unuiĝo. Ĝia temo estos "Esperanto kaj Komputiko". En ĝi okazos intensiva kurso pri la programadlingvo BASIC, debatoj pri komputikaj temoj, prezento de programoj por memlernado de Esperanto. Petu pliajn informojn kaj aliĝilojn de LKK ĉe str. Pozo, 3 E-41003 Sevilla, Hispanio.

E-EKSPOZICIOJ EN RUEIL, FRANCO

Dum diversaj festoj organizitaj de la urba administracio kaj aliaj asocioj geesperantistoj Louis kaj Zorka ENIZAN samtempe okazigis en Rueil ekspoziciojn kun multaj Esperanto-materialoj el Ĉinio kaj aliaj landoj por konstati, ke la internacia lingvo estas agnoskita de iliaj registaroj, oficiale enkondukita en la programon de ŝtataj lernejoj kaj fakultatoj kaj taŭgas por solvi la lingvan problemon.

第十五课
Dek kvin-a Leciono

问 姓 名

Kiel vi nomiĝas?

I. Ofte uzataj vortoj

您贵姓
我姓张
您叫什么名字
我叫王平
哪位是玛丽小姐
我就是
这位先生是谁
他是我的朋友, 鲍尔教授

认识您很高兴

我也很高兴
对不起, 打扰您了
没关系

nín guìxìng
wǒ xìng zhāng
nín jiào shénme míngzi
wǒ jiào Wáng Píng
nǎwèi shì mǎlì xiǎojie
wǒ jiùshì
zhèwèi xiánsheng shì shuí
tā shì wǒde péngyou, Bàoěr
jiàoshòu
rènshi nín hěn gāoxìng

wǒ yě hěn gāoxìng
duìbuqǐ, dǎrǎo nín le
méi guānxi

kia estas via familia nomo
mia familia nomo estas Ĝang
kiel vi nomiĝas
mi nomiĝas Ŭang Ping
kiu estas fraŭlino Maria
mi estas
kiu estas tiu ĉi sinjoro
li estas mia amiko, profesoro
Paŭlo
estas granda ĝojo konatiĝi kun
vi
ankaŭ mi tre ĝojas
pardonon, mi ĝenis vin
ne gravas

II. Dialogo

A: 您好!

A: Nín hǎo!
vi bon-

A: Bonan tagon!

B: 您好!

B: Nín hǎo!
vi bon-

B: Bonan tagon!

A: 您贵姓?

A: Nín guìxìng?
vi respektind- nom-

A: Kia estas via familia nomo?

B: 我姓张。

B: Wǒ xìng zhāng

mi famili- nom- Ĝang

B: Mia familia nomo estas Ĝang.

A: 您叫什么名字?

A: Nín jiào shénme míngzi?
vi nomiĝ- kia nom-

A: Kiel vi nomiĝas?

B: 我叫张华。

B: Wǒ jiào Zhāng Huá.
mi nomiĝ- Ĝang Hǔa

B: Mi nomiĝas Ĝang Hǔa.

A: 哪位是玛丽小姐?

A: Nǎwèi shì Mǎlì xiǎojie?
kiu est- Maria fraŭlin-

(Daŭrigo sur p. 44)

Antaŭen Strebantaj Junuloj de Ĉinio

STURMO AL MALFACILO

En aŭgusto de 1982, grupo da nove diplomitaj studentoj venis por labori en la Ŝipkonstrua Instituto sub la Ŝipfabriko Hudong de Ŝanhajo. La maljuna fabrikestro, kiu dediĉis siajn dekojn da jaroj al ŝipkonstruado, diris al la ambiciaj junuloj: "Mi esperas, ke post tri aŭ kvin jaroj vi povos memstare direkti laboron en certa branĉo kaj la ŝipindustrio en via generacio atingos kaj superos la avangardan nivelon de la mondo."

Jen la peza tasko falis sur la ŝultroj de la diplomitaj studentoj de la nova generacio. Tiam la fabriko konstruis por iu kompanio de Hongkong 36 000-tonelajn oceanajn ŝipojn por lozaj varoj. Kiam la unua ŝipo estis lanĉita al prova navigado, la junuloj vidis, ke la inĝenieroj de la instituto estas tre okupitaj: tage ili partoprenas en prova navigado kaj nokte ili ordigas diversajn donitaĵojn. Ĉiutage ili laboris ĝis profunda nokto, tamen malalta estis la efiko de ilia laboro.

La junuloj pensis, ĉu oni ne povos altigi la efikon kaj kvaliton de la provado, se oni uzos mikrokomputeron sur la ŝipo por fari kalkuladon pri la donitaĵoj de la navigacio?

Jen 18 junuloj starigis grupon de mikrokomputero. De tiam la junuloj absorbiĝis en studado pri komputero. Post nelonge ili ellaboris dek komputerajn programojn, inkl. de kalkulo de vibra frekvenco kaj stabila kalkulo.

Por popularigi la sciojn de komputero, la grupo funkciigis kvarfoje kursojn de mikrokomputero. Laŭ la bezono de sia praktiko la junuloj mem kompilis instruajn materialojn. Du trionoj de la teknikistoj de la instituto estis trejnintaj en la kursoj. Dank' al ilia penado populariĝis uzado de mikrokomputero en la fabriko.


Masto, grava parto de ŝipo, estas tre kompleksa en formo, kaj estas malfacile fari por ĝi kalkuladon pri ĝia forteco. Unu inĝeniero povis akiri nur tre fundamentajn donitaĵojn, kalkulinte plenan monaton, kio restis nesolvita problemo dum longaj jaroj. Nun, helpate de la kalkulaj programoj de aliaj landoj, la grupo elfaris en unu jaro la kalkulan programon

por la masta forteco. Nun tri minutoj jam sufiĉas por la operacio. Dank' al tio, multe pli raciigis la projekto de masto, malpeziĝis la masto, malaltiĝis la gravito de la ŝipo kaj grandiĝis ĝia stabileco.

Kiam la 36 000-tonela ŝipo Ŝiĝu estis en prova navigado, la grupo de komputero faris operaciojn sur la ŝipo. Ĉiu operacio ĝustatempe donis precizajn donitaĵojn kaj klarajn grafikaĵojn. Reprezentanto de ŝipmastro de la brita Lloyd-a Registranto de Ŝipado, kiu partoprenis en la prova navigacio, montris grandan kontenton pri la ŝipo kaj senprokraste subskribis la kontrakton. Tiutipa ŝipo estis premiita de la ŝtato per ora medalo.

Junula grupo de mikrokomputero studas komputeran programon.





Diplomitaj studentoj manipulas komputeron.

Foje en la pasinta somero, sur la Suda Ĉina Maro blovis tajfuno de ses-gradoj. Kiam la Brita Petrola Kompanio B. P. ordonis sian ŝipon "Sidnejo" tie laborantan reveni en la havenon, ekblovis tajfuno de 12 gradoj, kaj la ŝipo frontis al danĝero. La ŝipo "Sidnejo" estas nove konstruita de la fabriko. Dum la tuta procedo de la projektado de la ŝipo oni aplikis la operaciajn programojn ellaboritajn de la junuloj de la grupo. Ĉu la ŝipo eltenos la provon de tajfuno de 12 gradoj? Ĉiuj ŝipanoj maltrankviliĝis. "Sidnejo" eltenis la provon, bone plenumis sian taskon kaj sekure revenis en la havenon.

En la pasinta oktobro, kiam ŝipo, konstruita de la fabriko, veturis al Egiptio, okazis eksterordinara danĝero por marnavigado. En ventego kaj ondegaj la ŝipo skuiĝis ĝis 54 gradoj, ke ĝi preskaŭ rompiĝis. Maltrankviliĝis la egipta kapitano, ĉar li bone sciis, ke io nescienca en la projektado

kaŭzos rompiĝon al ŝipo. Sed la ŝipo eltenis la provon de ventego kaj ondegaj kaj sekure atingis Egiption.

Ankaŭ tiu ŝipo estis projektita de la junuloj de la grupo. La respondeculo de la grupo estas Baŭ Ŭejdong, pli-ol-dudek-jara. Li estas prezidanto de la Junula Asocio de Ŝipkonstrua Teknologio de la fabriko. Per novaj operaciaj programoj li kaj liaj kolegoj longigis la kajutojn ĝis maksimumo kaj reduktis la koeficientojn de kurbiĝo kaj aliformiĝo de ŝipkorpo al minimumo, por ke pli raciigu la dislokiĝo de la forto sur la ŝipo. Pro tio la ŝipo eltenis la provon.

En la lastaj du jaroj la junuloj de la grupo plenumis 57 taskojn grandajn kaj malgrandajn en la helpa kalkulado de projektado de ŝipoj kaj analizo de materialoj de prova navigado. Ili multe kontribuis al projektado de novtipaj ŝipoj kaj intensigo de adaptiĝemo de ŝipo.

DEBUTO KUN BRILA SUKCESO

28-jara Song Gŭohuj fondis fabrikon de elektraĵoj, dank' al kio lia hejmvilaĝo fariĝis la plej riĉa en Ŝandong-provinco. Tamen la vojo ne estis glata.

Lia hejmvilaĝo Songĝjacun estis malriĉa pro multeco de vilaĝanoj kaj nesufiĉeco de kampoj. Antaŭe la knabinoj ne volis edziniĝi al la samvilaĝaj knaboj. En 1972 Song Gŭohuj diplomiĝis en mezlernejo. Li ĉagreniĝis pro la malriĉeco de la hejmvilaĝo. Li forte aspiris ŝanĝi la staton de la vilaĝo.

En 1979 li proponis al la respondeculo de la vilaĝo fondi fabrikon de elektraĵoj. Post kelkaj tagoj lia propono estis akceptita, kaj li estis nomumita fabrikestro kaj teknikisto. Li akceptis la komision kun skrupulo.

La juna Song bone sciis, ke la ŝlosilo de la sukceso estas trafitelekti specojn de elektraĵoj. Li vizitis 16 urbojn kaj guberniojn por fari enketon. Post longa konsidero li decidis produkti elektraĵojn inductilojn. Komparinte divers-tipajn elektraĵojn, li difinis la tipon, kaj baldaŭ sukcesis en produktado. En la sama jaro la fabriko profitis je tricent mil jŭanoj, sekve la meznombra enspezo de la vilaĝo atingis 820 jŭanojn (ĉ. 2.8 jŭanoj egalas al unu usona dolaro). En la pasinta jaro, la fabriko pligrandigis la produktadon, kaj la meznombra pokapa enspezo de la vilaĝo atingis 1 250 jŭanojn. Tiel la vilaĝo fariĝis la plej riĉa en la gubernio.

Tamen Song Gŭohuj ne estis memkontenta pri la sukceso. Li komencis projekti produktaĵojn de pli alta kvalito. Li kalkuladis, desegnadis kaj provfaradis, sed malsukcesis 13 fojojn. Tamen

Kritikoj kaj Proponoj

Mi volas koni la klopodojn de la ĉina registaro por subteni Esperanton, kaj strebojn de la ĉinaj esperantistoj por subteni la pacon aliel ol per armiloj.

COLNEY ROGER
Francio

En tiu ĉi pasinta jaro mi vidis ke vi parolis tre malmulte pri politikaj temoj, malgraŭ ke estis grandaj okazoj en Ĉinio kaj la tuta mondo. Do, mi proponas ke vi parolu multe pri politikaj aferoj tutmondaj kaj ĉinaj, por ke via revuo estu pli vigla kaj nia lingvo povu esti montrata kiel vera interkomunikilo.

PAOLO CERRETINI
Italio

Mi ŝatus, ke la revuo ankaŭ temos pri eksterlandaj artikoloj

pri internaciaj problemoj kaj novaĵoj ktp. Mi ŝatas ankaŭ ĉinan lukartan.

LUIS ALVAREZ T.
Ĉilio

Mi esperas legi la artikolojn, kiuj sciigas nin pri la ĉiutaga vivo de diversaj ĉinoj, prefere per priskribo de individuoj — vilaĝano, studento, dommastrino kaj sekretariino ktp.

W. J. NESBITT
Britio

Mi ŝatus koni iom pri ĉiutaga vivo en Beijing, ekzemple: kiel loĝas familio (aŭ fraŭloj), kiom da horoj laboras kaj ĉu la mono sufiĉas por ia komforto.

JORGE P. BONDONG
Argentino

Aspekto de la ĉina kultura vivo, pri kiu mi tre ŝatus legi precizajn informojn en la venontaj numeroj de via revuo, tio estas la klasika kaj popola muzikoj. Pri tiu temo oni tre malmulte scias ĉi tie.

JEAN-CLAUDE THUMERELLE
Belgio

Mi estas komencantino, tial longaj artikoloj estas tre malfacile kompreneblaj por mi. Mi preferas mallongajn artikolojn akompanatajn de bildoj.

METKA BURG
Jugoslavio

Bonvolu eviti multajn statistikajn nombrojn kaj ciferojn, ĉar ili facile faras iujn artikolojn malfacile kompreneblaj.

GEORGE H. DE-GOYA
Britio

Mi opinias, ke la artikoloj estas kutime tro longaj kaj dispersaj. Eble estus pli bone se oni publikigu pliajn artikolojn, sed pli mallongajn.

AMERIGO IANNACONE
Italio

finfine li sukcesis elfari novtipan elektran veldilon. Ekspertizo de koncernaj fakoj pruvis, ke la novtipa veldilo malmulte konsumas elektron, havas grandan amplekson de reguligebleco de kurenta forto, malgrandan kaj malpezan korpon. La veldilo estas tre bona al la merkato en Jantaj, Ĉingdaŭ, Daljan kaj aliaj urboj.

La produkta disvolviĝo de la fabriko de elektraĵoj multe famigis la vilaĝon. Kaj ŝanĝiĝis la opinio pri Song Gŭohuj. Tamen Song bone scias, ke li posedas iom da scioj krom la varma koro. Li firme memoras la devizon de la famá ĉina literaturisto

Fan Ĝongjan "zorgi la mondon pli frue ol la aliaj, ĝui pli poste ol la aliaj". Li opinias, ke literaturisto en la feŭda socio povis ĝuste trakti la interrilatojn inter la individuo kaj la socio, do por la junuloj de la nova Ĉinio servi al la popolo estas ilia devo. Por kiel eble plej rapide posedi la fundamentajn sciojn de produktado de elektraĵoj kaj teknikojn pri elektraĵoj, li ĉiam kunportis kun si librojn por legi en libera tempo. Li ofte legis profunda punkto. Post kelkaj penado li memlernis la kursojn de matematiko kaj fiziko por supera mezlernejo, memlernis ankaŭ parton de la kurso por supera

lernejo kaj faris notlibron kun pli ol cent mil ideografiaĵoj, dank' al kio li fundamente posedis la teknikojn pri projektado de produktado, fabrikado de muldilo, riparado de elektraĵoj, mekanka desegnado, manipulado de frotmaŝino kaj tornomaŝino kaj termotraktado.

Song Gŭohuj ne vane klopodis. En 1984 lia vilaĝo fariĝis la unua vilaĝo en Ŝandong-provinco, kies familioj meznombro enspezis dudek mil jŭanojn. La 52 familioj de la vilaĝo senescepte loĝas en duetaĝaj domoj kaj la vilaĝo havas kulturen domon de kamparanoj.

PASAĜERA HEJMO

de ŬEJ LJAŬ



Kiam dormas la pasaĝeroj en litvagono. . .



Trajnestro Ĉen Ŝingau donas lit-numeron al pasaĝero.

Antaŭ nelonge, mi veturis de Pekino suden al Ŝanhajo per ekspreso n-ro 13.

Kiam la lokomotivo moviĝis, en la laŭtparolilo eksonis afabla vira voĉo salutanta la pasaĝerojn:

“Bonan tagon, karaj pasaĝeroj!”

“Mi estas estro de la ekspreso. . . En la nomo de la Ŝanhaja Fervoja Buroo kaj ĉiuj niaj konduktoj, mi varme bonvenigas vin ĉiujn vojaĝi per nia trajno. . . . De nun, niaj konduktoj servos al vi. Bonvolu informi nin ĉiam ajn pri viaj postuloj kaj malfaciloj! Ni faros ĉion eblan por vin helpi. . .”

La trajnestro, mezaĝa kaj altstatura, nomiĝas Ĉen Ŝingau. En 1962 li fariĝis kondukto, kaj faris preskaŭ ĉiujn laborojn en trajno, li antaŭe laboris kiel trajna kuiristo, manĝo-vagona servisto, pakaĵvagona gardisto, manĝo-vagona estro ktp. Li bone konas sian trajnon, kio faciligas lian nunan laboron. Antaŭ la veturo de la ekspreso, sur la pekina perono, li zorgeme faris aranĝon por la pasaĝeroj maljunaj, malfortaj, malsanaj, kriplaj kaj infanoj. Tuj antaŭ la moviĝo de la ekspreso, li havigis al la kripla estro de iu bonstatiga fabriko litvagonan bileton, kiun tiu postulis, kaj lin sidigis en malsupran liton de la litvagono. La es-

tro de bonstatiga fabriko diris al mi kun emocio: “Kvankam la trajnestro estas tre okupata, li tamen persone sendis al mi la bileton kaj sidigis min en la deziratan lokon,” levante la dikfingron, li laŭdis, “la ekspreso vere meritigas la avangardan trajnon!”

La ekspreso kuregis suden kaj mi interparolis kun trajnestro Ĉen Ŝingau.

El nia interparolo mi informiĝis, ke ekde 1955 la ekspreso sesfoje gajnis la unuan lokon en la konkursoj inter la trajnoj al Pekino kaj Ŝanhajo. Ĝi havas 4 konduktojn grupojn, ĉiu kun 42 konduktoj, kies plejparto estas gejunuloj.

En la servado, ili esploras leĝon de servado, ĉiam laboras kun rideto kaj faras ĉion eblan por plibonigi la servojn, ekz. liveri al pasaĝeroj kun bebo beboliton, litkovrileton kaj kapkuseton; pruntedoni al la pasaĝeroj maljunaj kaj malfortaj pakaĵĉareton kaj porti al iliaj sidlokoj manĝaĵon; pruntedoni al ĉiuj pasaĝeroj diversajn librojn kaj revuojn; okazigi koncertan tekunsidon; provizi la pasaĝerojn per lakto, freŝa oranĝosuko, pladoj, vino ktp.; disaŭdigi leĝerajn kaj famajn ĉinajn kaj alilandajn muzikaĵojn. En la festaj tagoj, la ekspreso faras specialajn servojn, ekzemple, dum la Infana Festo,

ĝi provizas al infanoj donacetojn kaj rabate vendas al ili skatolajn manĝaĵojn.

Kun la senĉesa altiĝo de la viv-nivelo de pasaĝeroj, la manĝo-vagono plibonigis sian provizadon. Diversaj manĝaĵoj anstataŭis la simplajn skatolajn manĝaĵojn. Nun, ili provizas per 5 specoj de manĝaĵoj kaj 6 specoj de pladoj. Kaj ili liveras almanĝaĵojn kaj vinon al pasaĝeroj kaj aranĝas simplan manĝotablon en vagonoj. Krome, ili povas kontentigi bezonon de turistoj kaj junaj geedzoj pasigantaj la mielan monaton.

De la lasta tempo, oni proponas fumi ne en la vagonoj kaj establis simplajn fumejojn inter-vagone. Tio estas multe laŭdata de la pasaĝeroj. Laŭ mezurado de la Ŝanhaja Higiena Stacio, en la vagonoj de la ekspreso n-ro 13/14 la enteno de karbona monooksido reduktiĝis de pli ol 10 miligramoj/m³ al 4.52 miligramoj/m³.

La trajnestro sciigis al mi, ke junaj konduktoroj de la ekspreso organizis esploran grupon pri psiko de pasaĝeroj. Ilia esplorado inkluzivas sintenon, parolon

kaj konduton de konduktoroj kaj psikon de ordinaraj kaj apartaj pasaĝeroj. Tio multe interesis min kaj mi speciale intervjuis du membrojn de la grupo, Ŝjaŭ Fang kaj Ŝjaŭ Ŝju.

La 25-jara Ŝjaŭ Fang servis en la armeo 4 jarojn. Li rakontis al mi ion interesan en la ekspreso. Tiam li laboris kiel konduktoro de la ekspreso pli ol unu monatojn. Li verŝis bolintan akvon en tason por ĉ. 30-jara virino, sed tiu tuj elverŝis la akvon. Ŝjaŭ Fang pensis, ke ŝi volas tiel lavi la tason, kaj reverŝis akvon por ŝi, sed, ekster lia atendo, ŝi elverŝis refoje. Ŝjaŭ Fang pensis en si, ke eble ŝi ne volas akvon nesufiĉe varman. Li do alportis kruĉon kun akvo ĵus bolinta kaj refoje verŝis en ŝian tason, sed ŝi denove ĝin elverŝis. Antaŭ ol li volis koleri, li pensis, ke en tio certe ekzistis kaŭzo. Ŝjaŭ Fang afable diris al ŝi: "Se vi estas malkontenta pri mia servo, bonvolu diri al mi kaj mi nepre korektos." La virino konsciis sian konduton malĝentila kaj konfesis, ke ankaŭ ŝia profesio similas al la lia, kaj ŝi informiĝis de ĵurnalo, ke la ekspreso n-ro 13/14 estas avangarda trajno en la tuta lando,

ŝi volis rigardi, ĉu ilia bona servo estas vera? Ŝia spertaĵo pruvis ilian servon laŭdinda! Ŝia parolo estigis ridon ĉe la ĉirkaŭaj pasaĝeroj.

Ŝjaŭ Ŝju kun bela vizaĝo, simila al knabino, ĉiam atente observas psikon de pasaĝeroj. Foje, vidinte, ke iu pasaĝero pendigis kelkajn lavitajn naztukojn por ilin sekigi, Ŝjaŭ Ŝju pensis en si, ke tiu certe malvarmumiĝis, alie li ne uzas tiel multajn naztukojn. Ŝjaŭ Ŝju portis al li medikamenton kaj akvon, antaŭ kiuj la pasaĝero demandis kun miro: "Kiel vi scias, ke mi malvarmumiĝis?"

Post la intervjuo, mi sola trairis la vagonojn. Ĉiuj fenestroj estis puraj, la pakajoj sur pakaj-bretoj kaj la mantukoj sur ferdratoj ĉiuj estis bonorde aranĝitaj. Tiam, la ekspreso veturis jam 7-8 horojn, sed pureco kaj komforteco ankoraŭ regis en la vagonoj. Ĉio ĉi vekis ĉe mi admiron.

Informiĝinte, ke mi estas ĵurnalisto de la revuo "El Popola Ĉinio", pasaĝeroj venis al mi unuj post aliaj kaj unuvoĉe diris al mi: "La ekspreso vere estas pasaĝera hejmo, kiel oni ĝin nomas."

Konduktoro servas al pasaĝeroj.



En manĝovagono





Parto de la ĝardeno Sizilin

VOJAĜO TRA ĈINIO

ĜARDENA URBO SUĜOŬ

de **GANG ĈANGJI**

Fotoj de **HAI FENG, JAN ĜIN kaj ŬEJ BO**

En Ĉinio cirkulas de antikve proverbo “La plej bela en la ĉielo estas paradizo kaj en la homa mondo Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ”. Dum jarmiloj Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ ĝuas renomon de “surteraj paradizoj”, kaj allogas al si turistojn en- kaj eksterlandajn. La beleco de Hangĝoŭ montriĝas en la natu-

raj pejzaĝoj, precipe en la bela Okcidenta Lago, la ĉarmo de Suĝoŭ vidiĝas en la artefaritaj ĝardenaj pejzaĝoj. Suĝoŭ estas konata kiel mondfama ĝardena urbo ĉie kun graciaj kaj klasikaj ĝardenoj.

La ĉinaj klasikaj ĝardenoj dividiĝas en kvar specojn, nome ĝar-

denojn de imperiestroj aŭ reĝoj, privatajn loĝejojn, templojn kaj vidindajn pitoreskejojn. Ili ĉiuj vibebblas en Suĝoŭ.

La potenca U-regno konstruis la urbon Helju (la hodiaŭa Suĝoŭ) en la delto de Jangzi-rivero antaŭ 2 500 jaroj. Venkite de U-regno, Goŭĝjan (?-465 a.K.),

reĝo de Jüe-regno, donacis la belulinon Ŝjiŝi al Fuĉaj (?-473 a. K.), reĝo de U-regno. Por ŝin loĝigi Fuĉaj elspezis la tutan havon por grandskale konstrui la Belulinan Palacon sur la monto Lingjan de la antaŭurbo. La ore brilanta palaco kun traboj kaj kolonoj surhavantaj gravuraĵojn kaj pentraĵojn havis luksan koridoron Ligna Pantoflo. Ĉiutage la palacaj servistinoj kun jadaj ornamaĵoj kaj en lignaj pantofloj dancis en la koridoro por distri la reĝon kaj belulinon. De tiam pasis jarmiloj kaj malaperis ankaŭ la Belulina Palaco, tamen hodiaŭ sur Lingjan-monto videblas ankoraŭ la Teraso de Sepkorda Muzikilo, Puto de U-reĝo, Luno-rigarda Lageto kaj Florprezenta Roko, kiuj allogas al si multege da turistoj. Krome, sur la Okcidenta Dongting-monteto en Tajhu-lago, okcidente de Suĝoŭ, estas ruinoj de la Someruma Palaco, Someruma Golfo kaj Turda Fonto, kiuj servis kiel somerumejoj de Fuĉaj kaj Ŝjiŝi.

La plej elstaraj estas la Okcidenta Ĝardeno kaj Templo Hanŝan el la Suĝoŭ-aj ĝardenoj kaj

temploj. La Okcidenta Ĝardeno, situanta ekster Ĉang-pordego, estas ĝardeno de templo kun 500 arhatoj ene. Meze de la ĝardeno kuŝas lago, kie naĝas diverskoloraj karpoj kaj cent-jara testudo. Ĉirkaŭ la lago staras pavilonoj, kioskoj kaj domoj, prosperas floroj kaj arboj. Antaŭ la ĉefa konstruaĵo estas framo kovrita de volve-grimpantaj visterioj bonodorantaj. En la centro de la lago staras majesta kiosko, kies ombro klare vidiĝas en la akvo. Ili ĉiuj estas allogaj por turistoj. La templo Hanŝan famiĝis pro la belaj versoj de Ĝang Ĝji de Tang-dinastio en la oka jarcento:

De Hanŝan-templo ekster Gusu sonorad' alŝvebas,

En noktomez' al nia ŝipo gasta sur rivero.


En ĉiu jarfina noktomezo, centoj kaj miloj da eksterlandaj turistoj venas ĉi tien speciale por aŭskulti la novjaran sonoradon de la templo.

En Suĝoŭ estas multaj belaj pejzaĝoj kaj historiaj objektoj, inter kiuj la plej alloga estas la Tigra Monteto. En la lastaj jaroj


de la periodo Printempo kaj Aŭtuno Helju (? — 496 a. K.), potenca reĝo de U-regno, mortis de grava vundo kaŭzita en batalo kontraŭ najbara lando. Li estis enterigita en monteto nordokcidente de Suĝoŭ. Legendo diras, ke tri tagojn post lia enteriĝo, sur la monteto aperis dia tigro kun blanka frunto kaj oraj okuloj kaj de tiam la monteto estas nomata Tigra Monteto. Dank' al konstruado de postaj dinastioj pli kaj pli ĉarmiĝis la tiea pejzaĝo. Antikvuloj priskribis ĝin tiel: "Pagodoj elrigardas el la arbaro kaj temploj sin kaŝas en la monteto."


Sed el la multaj belaj ĝardenoj en Suĝoŭ la plej ĉarmaj estas tiuj de la privataj loĝejoj. Estas bone konate, ke Suĝoŭ havas belajn pejzaĝojn, abundajn produktaĵojn kaj diversajn talentulojn. Tial altranguloj, nobeluloj kaj literaturistoj de diversaj dinastioj deziris aĉeti tie bienon kaj starigi privatajn loĝejojn kaj ĝardenojn. Kronika literaturo de Suĝoŭ diras, ke inter 162-1874 tie estis 190 famaj privataj ĝardenoj sole en la gubernioj Uŝan, Ĉangĝoŭ

Sonoril-turo en la templo Hanŝan



La pitoreskejo Canglangting





Turisto en Suĝoŭ

kaj Jŭanhe sub Suĝoŭ. La ĝardenoj ĉiuj portas apartan karakterizaĵon pro konstruado en malsamaj jaroj, malsamaj ĝardenaj mastroj kaj malsamaj kulturaj klerecoj kaj stiloj de la projektintoj kaj konstruantoj. La elito de la ĝardenoj estas la kvar famaj ĝardenoj — Canglangting, Ŝizilin, Ĝuoĝeng kaj Liŭjŭan, kiuj reprezentas diversajn arkitekturajn stilojn de Song-, Jŭan-, Ming- kaj Ĉing-dinastioj.

La ĝardeno Canglangting konstruiĝis en 1041-1048 p. K. en Song-dinastio. Estas originala ĝia dispozicio kun ne tute fermita formo. Enironte la ĝardenon, oni vidas verdan akvon ĉirkaŭe, plorsalikojn balanciĝantaj, lagon, groteskajn rokojn, kioskojn kaj surakvajn pavilonojn en harmonia aranĝo. Klasika ŝtona ponto kondukas al la ĝardeno, ĉirkaŭe de termonteto dissemiĝas haloj kaj salonoj, kiuj laŭ la montodeklivo kondukas unu al alia per zigzagaj koridoroj. Sur la montokresto sin kaŝas ŝtona kiosko en

verda pinaro kaj cipresaro. Jen la fama antikva kiosko Canglangting. Promenante en la ekstera koridoro, uzita kiel ĝardenamuro, oni povas ĝui la belajn pejzaĝojn tra la milformaj fenestroj. La konstruaĵoj, montetoj kaj arbaroj kaj la pontetoj kaj fluantaj riveretoj ekstere aspektas kviete kaj ĉarme.

La ĝardeno Ŝizilin konstruiĝis inter 1341 kaj 1368 p. K. en Jŭan-dinastio. La ĝardeno ricevis la nomon pro la kuriozaj rokegoj leon-similaj (Ŝizilin signifas leonaron en la ĉina lingvo). Tie la plej allogaj estas ĝiaj kuriozaj artefaritaj montetoj. En malgranda areo estas multaj kuriozaj rokegoj kaj zigzagaj vojetoj, kiuj iras tra diversaj grottoj. Irante inter ili, oni ofte aŭdas nur voĉojn, sed ne vidas la homojn, kio vekas apartan intereson ĉe la turistoj.


La ĝardeno Ĝuoĝeng konstruiĝis inter 1506 kaj 1521 p. K. en Ming-dinastio. La ĝardeno konsistas el tri partoj, la konstruaĵoj

plejparte troviĝas ĉe akvo, la akva surfaco konsistigas trionon de la ĝardeno areo. Ĝi sin karakterizas per natura simpleco, vasteco kaj gracieco de Ming-dinastio. La plej bela parto de la ĝardeno troviĝas en la mezo. Tie kioskoj kaj terasoj sur la fono de la monto kaj akvo ĉiuj rigardas al la ĉefa konstruaĵo Jŭanŝjanghalo. La konstruaĵoj estas ligitaj per pontoj kaj longaj koridoroj. La ĝardeno Ĝuoĝeng vere indas la honoron de ĝardenamajstroverko de suda Ĉinio.

La ĝardeno Liŭjŭan ekster Ĉang-pordego estas karakterizita per la arkitektura stilo de Ĉing-dinastio. La ĝardeno nomo aludas eternan junecon. En malgranda areo la ĝardeno sin dividas en kvar partojn laŭ la lokiĝo de domoj, muroj kaj koridoroj: Meze estas pejzaĝo monta kaj akva, oriente kortaj konstruoj, norde kampara pejzaĝo kaj okcidente arbara sovaĝejo. Ili estas ligitaj unu kun alia per koridoroj, fenestroj senvitraj kaj diversformaj. La arkitektoj admiris, ke la ĝardeno estas elstara en la spacodivido laŭ la vidpunkto de la ĝardenkonstrua arto.

En Suĝoŭ, krom belaj ĝardenoj, troviĝas ankaŭ multaj aliaj vidindaj lokoj. La turistojn ravas la antikva urbo kun grandnombraj pontetoj super riveretoj kaj domoj starantaj tuj ĉe la akvo, la belega Suĝoŭ-a brodaĵo, desegnoritaj kaj ĉarmaj silkaĵoj, mirindaj metiartaĵoj, belsona kaj oreplaĉa rakonta balado de Suĝoŭ kaj la okulplaĉaj, aromaj kaj bongustaj pladoj.

Nun Suĝoŭ estas turisma urbo fama tra la tuta mondo. Tie estas kvietaj kaj altklasaj hoteloj, kiaj Nanlin, Suĝoŭ, Gusu, Leŝjang, Dong'u, Nanjŭan kaj Juŝan. Ili ĉiam donas al la vizitantoj bonan servon, ke ili vivu en kontento.



Peizaço de Liūjūan-gârdeno

Foto de U FUCJANG




Turistoj ĉe la Tigra Monteto en pluva tago



Ŭangŝi-gardeno


Belaj brodaĵoj de Suĝoŭ



*Metiartaj ventumi-
loj tre bonvenaj al
turistoj*



La hotelo Suĝoŭ



La antikva templo Sĵuanmjaŭĝuan

MALFERMITAJ URBOJ



En la nova haveno Hŭangpu

KANTONO – LA SUDA PORDO DE ĈINIO

de LI ĈJANG

Fotoj de ŜEN ĈEN



La tekstila eksponejo de la Kantona Foiro

Foto de LI ĈJANG

Parto de Kantono



Apud la Perlo-rivero estas bela kaj riĉa urbo Kantono, konata kiel la suda pordo de Ĉinio. La urbo estas fondita en Ĉin-dinastio, antaŭ 2 100 jaroj.

Kantono staras ĉe la piedo de Bajjun-monto, fronte al la vasta Suda Ĉina Maro kaj najbare de Hongkong kaj Aŭmen: ĝia situo estas tre bona. Ĝi estas la politika, ekonomia kaj kultura centro de Gŭangdong-provinco kaj pivoto de mara, aera kaj tera trafiko de suda Ĉinio. Ĝia haveno Hŭangpu estas unu el la ĉefaj havenoj de nia lando. Ĝiaj navigaj kursoj kondukas al pli ol 350 havenoj de pli ol 100 landoj kaj regionoj. La Pekin-Kantona Fervojo trairas Ĉinion sude-norden.


Aviadiloj de internacia flughaveno Bajjun interligas ĝin kun enlandaj grandaj urboj kaj Bankoko, Manilo kaj Sidnejo k.a. Kantono estas ankaŭ internacia komerca havenurbo de Ĉinio kaj ludas gravan rolon inter la aliaj dek tri malfermitaj urboj de Ĉinio.

Kantono administras sep kvartalojn kaj sep guberniojn, kun totala areo de 16 000 kvadrataj kilometroj kaj 6.98 milionoj da loĝantoj. La urba parto havas areon de 230.7 kvadrataj kilometroj kaj 2.37 milionojn da loĝantoj. Ĝia loĝantaro havas intiman kontakton kun multaj landoj kaj regionoj, ĉar pli ol miliono da eksterlandaj ĉinaj elmigrintoj kaj

samlandanoj de Hongkong kaj Aŭmen estas naskitaj en Kantono. Ili ĉiam prizorgas la ŝanĝojn de sia hejmoloko kaj multaj el ili kontribuis por la disvolviĝo de Kantono.

Antaŭe Kantono estis konsumara urbo, sed nun ĝi jam disvolviĝis en urbon kun diversaj industriaj branĉoj baze de tekstila industrio. Kantono havas pli ol 4 000 fabrikojn, kaj koncerne al la totala industria produkta valoro ĝi viciĝas inter la unuaj grandaj urboj de Ĉinio. En produktado de tekstiloj, artaĵoj kaj ŝipoj k.a. ĝi okupas gravan pozicion en la industrio de Ĉinio. Ĝiaj elektraj aparatoj estas plej renomaj, kaj multaj el ili havas debiton ne nur enlan-

La Kantona Petrol-kemia Fabriko



de sed ankaŭ eksterlande. Rizo, legomoj kaj fruktoj estas ĝiaj ĉefaj produktaĵoj de agrikulturo, samtempe oni disvolvis ankaŭ aliajn flankproduktojn. Ĝi havas pli ol 200 000 hektarojn da agroj. Ĝiaj specialaj lokaj produktaĵoj estas bambuido, amelo el lotusradikoj, oranĝoj, liĉioj, ananasoj, bananoj, cidonioj kaj diversaj floroj.

Frue en Ĉin- kaj Han-dinastioj (221 a. K. — 220 p. K.), Kantono jam estis internacia komerca havenurbo de Ĉinio, antaŭ la dua jarcento p. K., tie estis stratpunkto de la "mara silka vojo". En Tang-dinastio (618 — 907 p.K.) ĝia internacia komercado estis la plej vigla en la tuta lando. Post kiam Ĉing-dinastio (1664—1911 p. K.) praktikis la politikon fermi la landon, ĝi ankoraŭ estis la sola internacia komerca havenurbo de Ĉinio. Hodiaŭ sekve de praktiko de la politiko pluaparte malfermi Ĉinion al la mondo, Kantono ludas pli gravan rolon en la internacia komercado. Printempe kaj aŭtune de ĉiu jaro okazas en Kantono la Komerca Foiro de Ĉinaj

Eksportaj Komercaĵoj. Ekde 1957 ĝis nun ĝi jam okazis 57-foje. Printempe de tiu ĉi jaro la foiron partoprenis pli ol 24 000 komercistoj el pli ol 90 landoj kaj regionoj en la mondo. Eksterlanda komercado de Kantono disvolviĝis tre rapide. La totala valoro de enportitaj kaj eksportitaj komercaĵoj ĉiujare kreskas meznombre je 20%. La Kantonaj produktaĵoj famaj en la historio kaj la novaj produktaĵoj trovis bonan merkaton en 140 landoj kaj regionoj de la mondo, ĝi jam faris negocon kun miloj da eksterlandaj komercaj entreprenoj kaj plejparto de ili kontentas pro tio, ke Kantono observas la principon de egaleco kaj reciproka profitigo, kaj ĉiam fidele plenumas la kontraktojn.

Por pliaparte efektiviĝi la malferman politikon, la kantona popola registaro decidis starigi distrikton por ekonomia teknika ekspluatado kun areo de 9.6 kvadrataj kilometroj. La distrikto distancas je 35 kilometroj de la urba centro, je 114 kilometroj de Ŝenĝen kaj 88 marmejloj de Hongkong laŭ akvovojo de la

Perlo-rivero. Ĝi havas ne nur bonan situon kaj facilan trafikon, sed ankaŭ estas ebena kaj oportuna por konstruado. La distrikto praktikos politikon similan al tiu por ekonomia speciala distrikto, ĝi donas al fremlandaj komercistoj favorajn kondiĉojn en ilia investado kaj kunlaboro. Laŭ unuaparta plano Kantono enkondukos 44 industriajn kaj sciencsplorajn objektojn en 1985.


La ĉefa tasko de la distrikto estas ensorbi eksterlandajn kapitalojn, enkonduki avangardajn teknikojn, informojn kaj administrajn spertojn en la mondo kaj kulturaj specialistojn. Ĝia unuaparta konstruado ampleksas areon de 2.6 kvadrataj kilometroj. Oni deziras kunaranĝi industriajn administrejojn, komercejojn, kulturajn instalaĵojn, loĝejojn k. a. en la distrikto kaj aldone konstruos en ĝi perfektajn modernajn publikajn instalaĵojn laŭ la postuloj de konstruado de novtipa kaj altnivela ĝardensimila kvartalo, samtempe kun emfazo de la unualokeco de disvolvado de novteknikaj industriaj projektoj, por ke ĝi fariĝu nova kvar-

Ebura skulptaĵo de Kantono ŝatata de eksterlandaj turistoj




Ĉiovendejo en la Suda Domego





Kontenera kajo de Hŭangpu-haveno



Sodakvo produktita de la Azia Sodakva Fabriko de Kantono per aŭtomata produkta linio importita el alia lando havas grandan debiton en Hongkong, Aŭmen kaj sudorienta Azio.

talo utila al produktado, taŭga por eksterlanda ekonomia aktivado kaj oportuna por vivo de la loĝantaro.

Kantono ne nur havas fortan bazon ekonomian, sed ankaŭ bonajn kondiĉojn por disvolvi turismon. Ĝi havas varmetan klimaton kaj sufiĉan pluvokvanton. La verdigita areo de la urbo atingis 1 000 hektarojn. Ĉie en ĝi verdas razenoj kaj belas floroj en ĉiuj sezonoj, tial oni nomas ĝin "flora urbo". Pitoreskeco kaj multeco de historiaj konstruaĵoj estas alia karakterizaĵo de Kantono.

Por akcepti la gastojn el diversaj landoj, la turisma organizo de Kantono posedas kompleton de servoj de manĝo, loĝado, trafiko kaj ekskurso. Tie oni povas oportune ripozi kaj bone manĝi. La Kantona kulinaro arto kreis sian apartan stilon karakterizatan per freŝeco, gliteco

kaj beleco en koloro, gusto kaj formo. En lastaj jaroj kelkaj famaj hoteloj, aŭ per propra investo aŭ kunlabore kun komercistoj de Hongkong, enkondukis modernajn ekipaĵojn, kaj aranĝis belaspektajn manĝejoj kun komfortaĵoj, kion multe laŭdis en- kaj eksterlandaj gastoj.

Pro tio, ke Kantono havas bonajn kondiĉojn en ekonomio, investado, merkato kaj laborfortoj, entreprenistoj de Hongkong, Aŭmen kaj fremdaj landoj estas fidoplenaj por investi en Kantono. De 1979 ĝis la fino de 1984, Kantono subskribis 283 kontraktojn pri fondo de entreprenoj de en- kaj eksterlandaj investoj, kunlabora funkciigo kaj komerca komerco, la totala investo de eksterlandaj komercistoj atingis 707.28 milionojn da usonaj dolaroj. En la unua kvarono de 1985, ĝi sub-

skribis 95 kontraktojn pri utiligo de eksterlandaj investoj, kun totala sumo de 129 milionoj da usonaj dolaroj t. e. 7.9-oblo de tiu de la sama tempo de 1984. Por kontentigi la bezonon de la politiko "pluapase malfermi la pordon al la mondo" kaj faciligi kunlaboron kaj intertraktadon kun eksterlandaj komercistoj, starigis en la fino de januaro 1985 la Kantona Ĝenerala Oficejo por Aferoj de Eksterlanda Komerco. Ĝin partoprenas la Ĝenerala Kompanio pri Konsulto de Eksterlandaj Komercioj de Kantono kaj aliaj 11 entreprenoj oferas servojn de konsulto pri investado, kredito, leĝo, administrado de industrio kaj komerco, financaj aferoj, imposto, konstruado, laborfortoj, komerco kaj dogano. Ĝi ankaŭ helpas gastojn solvi koncernajn problemojn, ĉio ĉi tio estas multe laŭdata de eksterlandaj komercistoj.



Hu Sjaŭping en prezentado

Kantistino Honorita per Floroj

Estis tago de frua printempo ĉi-jare en Leningrado.

Eklumis lampoj. La ŝtata koncertejo Glinka estis feste iluminita. La lamplumo interbrilis kun la dika neĝtavolo ekster la halo. Proksime sur strato florvendisto senĉese prenis el vitra kloŝc kun brulanta kandelo bukedon kaj bukedon da diantoj kaj tulipoj kaj donis ilin al klientoj. "Ho, mia dio, tuj elĉerpigos la floroj, kvankam ĉiu bukedo kostas dekelkajn rublojn!" Eks-citite murmuris la vendisto al si mem.

Efektive tie okazis la lasta recitalo de ĉina kantistino Hu Sjaŭping en Sovetio. La koncertejo Glinka kun historio de preskaŭ du jarcentoj estas atesto de la alta apreco de Leningradanoj pri muziko kaj arto. Kiam Hu Sjaŭping kantis la "Printempan Tajdon" de la rusa komponisto Raĥmaninof, la aŭskultantoj, kvazaŭ ravigitaj de vodko, manklakadis kaj kriadis "Bis! Bis!" Ili interrompis la anoncistinon kaj kriis al

pianakompananto Ĝu Sjanĝje: "Ĝu! Ĝu!" Hu Sjaŭping kaj Ĝu Sjanĝje foje-refoje dankis la aŭskultantojn, tamen ĉi tiuj ne ĉesis krei, ĝis la anoncistino petis ilin ripeti la "Printempan Tajdon". Kaj tuj la printempa tajdo ekscitis la antikvan koncertejon. Hu Sjaŭping prezentis por Leningradanoj ankaŭ la ĉinajn polkantojn "Lirlas Rojo" kaj "Buntaj Nuboj kaj Freŝaj Floroj". Dum paŭzo multaj el la spektantoj svarmis malantaŭ la scenejon por saluti la ĉinan kantistinon. Iu spektanto el alia urbo diris: "Estas inde por mi veturi de Kirovo al Leningrado por aŭskulti vian 'Printempan Tajdon'." Alia diris: "Vi konkeris Leningradanojn." Ili admiris la elstaran kantadon, perfektan stilon kaj ĉarman teniĝon de Hu Sjaŭping kaj ankaŭ la silentan kunlaboron inter ŝi kaj Ĝu Sjanĝje: "Brave dolĉa kiel mielo!" Ili estas geedzoj, kompreneble dolĉaj kiel mielo," aldonis bone informita spektanto.

Ĉe la fino de la prezentado oni superŝutis la pianon per freŝaj floroj kaj manklakadis 11 minutojn. Hu Sjaŭping longe staris sur la scenejo por adiaŭi la aŭskultantojn. Sed kiam ŝi venis post la scenejon, ŝin tuj ĉirkaŭis spektantoj venintaj por donaci al ŝi florojn, por peti skribon de ŝia nomo, por. . . Ekster la halo atendis ankoraŭ multaj aliaj malgraŭ la temperaturo de pli ol 20 gradoj sub la nulo. Ili ritme kriis ĉirkaŭ la aŭto: "Ĉinio!" "Hu Sjaŭping!" Geknaboj enmanigis al Hu Sjaŭping belajn poŝtkartojn, el kiuj unu surhavas tiajn vortojn: "Memoru la leningradajn spektantojn, ĉiam dankajn al vi." Eĉ la ĉinaj studentoj, elirintaj el la muzika halo, estis ĉirkaŭitaj de sovetiaj amikoj kaj devis akcepti ilian gratulon. Surprizite, ili sentis, ke tio estas ĉarma "ĉina nokto" malofta en Leningrado. Iu pli-ol-80-jara maljunulo, kiu iam laboris en Ĉinio, salutis en la ĉina lingvo: "amikeco, amikeco, granda ĉina popolo!"

En la daŭro de dek tagoj la fervoraj aŭskultantoj prezentis freŝajn florojn kaj montris amikan senton al Hu Ŝjaŭping ĉie en la kvin urboj, kiujn ŝi vizitis.

En la tago de ŝia unua prezentado en Moskvo, ankaŭ la unua en Sovetio, la koncertejo de la Moskva Konservatorio estis plene ornamita per freŝaj floroj kaj plenplena de spektantoj kaj iuj devis stari en irejoj de la dua etaĝo por ĝui ŝian prezentadon de voĉmuzikaj verkoj de diversaj skoloj kaj diversaj stiloj en la lingvoj rusa, itala, franca, germana kaj ĉeĥoslovaka. En intertempo vicprezidanto de la Sovetia Ĉinia Amikeca Asocio, membro de la Sovetia Akademio de Sciencoj, iris kun bukedo sur la scenon por gratuli ŝin pro ŝia sukcesa prezentado kaj deziris al ŝi feliĉan novjaron. Dum tiu prezentado ŝi akceptis florojn 18 fojojn. La ĵurnalo "Sovetia Kulturo" laŭdis, ke ŝi "ĉiuflanke montris siajn talenton kaj lerte-

con" kaj "gajnis la rigardantojn per sia sincera sento".

En Rigo, la ĉefurbo de Letonio, iuj rigardantoj kun afiŝo enmane staris duonhoron ekster la halo en frosta vento kaj en neĝo ĝis la genuoj por atendi ŝian manpremon.

En Vilno, la ĉefurbo de Liovio, ŝi, kvankam malsana, bone plenumis la prezentadon. La muzika direktanto de la Vilna Filharmonio diris kun emocio: "Ni dankas vin, ke en tiel malvarma tago vi donis tiel varman prezentadon." Iu verkisto alparolis Hu Ŝjaŭping, kun profunda sincereco: "Dank' al vi ni vidis Ĉinion! La beleco, kiun vi esprimis, ĉiam restos en nia memoro."

En Minsk, la ĉefurbo de Belorusio, eĉ neĝego ne povis malhelpi la fervorajn rigardantojn. Post la fino de la prezentado multaj ankoraŭ ne volis foriri. La sovetiaj rigardantoj admiris, ke la ĉina kantistino tiel perfekte mas-

tris la tradician okcidentan belkantadon. Ili tre miris, ke ŝi ludis verkojn de Mozart, Haydn, Glinka, Gounod, Faure, Puccini, Verdi kaj Raĥmaninof en iliaj respektivaj naciaj lingvoj. Iuj ĵurnalistoj eĉ raportis, ke ŝi iam lernis muzikon en Italio, kaj ŝi devis foje-refoje klarigi, ke ŝi el-lernis la italan belkantadon en Ĉinio. Iuj rigardis tion unu el la klaraj pruvoj, ke la ĉina popolo povas posedi ĉiajn erojn de la monda civilizacio.

La sincera korinklino de la sovetia popolo al la ĉina popolo profunde tuŝis la koron de la juna ĉina kantistino, kaj ankaŭ la ĝentileco de la sovetiaj rigardantoj al la ludanto kaj ilia kompetenteco de apreco al muziko profunde impresis la kantistinon.

Hu Ŝjaŭping revenis al la patrujo. Ŝi restigis sian voĉon en Sovetio kaj kunportis al la patrujo la amikecon de la sovetiaj rigardantoj kaj popolo al la ĉinaj kantistoj kaj popolo.

Hu Ŝjaŭping antaŭ la maŭzoleo de Lenin en Moskvo



KIAM PLUVIS . . .

(novelo)

Ilustraĵoj de GANG LINGGI

Pluvo, enuiga pluvo. Pluvakvo fluis sur la tero, kaj sur la ekzamina papero estis demando "Kio estas pruna pluvo?"

"En la musona regiono, la fenomeno de moviĝo de pluva zono. . ." mi skribis, "en majo, la pluva zono vagadas". "Kiam maturiĝas la prunoj, pluvo faladas kontinue. . ." Kontinua pluvo!

En tagmezo la ĉielo estis serena, sed nun plumbaj nuboj dense kovris la ĉielon. Venteto blovis la pluveton, kaj la pluvo flugis jen orienten jen okcidenten. Enuiga pluvado!

La instruisto atentigis: "Ne rigardu eksteren. Viaj gepatroj certe alportos al vi ombrelon aŭ mantelon. Koncentru la atenton, kaj nur per bonaj notoj vi povos danki viajn gepatrojn, kiuj alportos al vi ombrelon spite la pluvadon."

Ĉiuj aliaj trankviliĝis, sed mi klare konsciis, ke neniu alportos al mi ombrelon. Estus bone, se neniu alportus ombrelon, kaj tiam ĉiuj egale tramalsekiĝus en la pluvado.

Tamen oni venis kunportante ombrelon aŭ mantelon. La unua estis la avino de Song Ŝin. Ĉu ŝi ne timas glitfali?

Venis ankaŭ la patro de Jang Doŭ. La instruisto transprenis la pluvombrelon kaj metis ĝin apud la tablon de Jang Doŭ. Jang Doŭ fiere turnis sin al mi. Hm, maliculo!

Mi sentis malagrablecon kaj turnis rigardon ekster la fenestron. La sportejo de la lernejo estis plena de pluvakvo. La pluvo ŝajne fariĝis pli kaj pli forta, estigante sennombrajn vezikojn, kiuj krevis poste, farante nebulon el akveroj.

Mia patro estas metalurgiisto. La fabriko distancas de nia hejmo malproksime. Li iras labori frue kaj revenas hejmen malfrue. Mi scias, ke lia laboro estas peniga.

Mia patrino estas komizino de vestobutiko kaj ŝi vestas sin plej mode en nia familio.

Malvarma aerfluo entrudiĝis tra la fenestra fendo, kaj mi senkonscie mallongigis la kolon kaj malvolvis la kuspe falditajn manikojn. Bruas la pluvtuboj sur la

tegmento kaj la pluvakvo krake fluis sur la cementa grundo. Mia patro estas bona laboristo. Jen ĉiuj kovriloj de miaj libroj estis faritaj el la honoraj kartoj de mia patro. Mi ne scias, kial mia patrino ĉiumonate estas premiata per mono. Ĉu ŝi ne kverelis kun klientoj? Tamen ŝi ofte kverelis kun mia patro. Se la patro revenis de laboro malfrue, se estingiĝis la forno, se malpuriĝis la vesto, se erodiĝis la ledŝuoj, se la patrino ne havis la ŝancon rigardi filmon en du monatoj, aŭ ne iris al parko en duonjaro . . . pro ĉio ĉi ŝi povis ekflamiĝi. Ŝia kverelado estas enuiga, kapdoloriga kaj eĉ stultiga. Mia cerbo tuj ekzumas ĉe ilia kverelo.

Ho, proksimiĝas al mi la instruisto, kaj mi devas ion skribi:



“Jen estas la prunpluva periodo de la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero.”

Mi ŝatas prunan bombonon, sekve mi neniam forgesos la vorton pruno.

La patro ofte diris al mi, ke la prunaj bombonoj estis ŝanĝitaj kontraŭ lia ŝvitiga laborado. Ĉiu afero havas du flankojn: amaran kaj dolĉan. Li ofte diris: “Ĉu homo mallaborema povas esti kalkulata kiel viva homo?”

Mi estimas la patron, ke li neniam timas lacon.

Foje mia patro revenis tre malfrue. La patrino nur purigis la tablojn kaj seĝojn kaj ŝvabris la plankon, sed ne preparis manĝon. Tial mia patro devis mem prepari vespermanĝon, kvankam estis tre malfrue, tamen la patrino ironie diris: “Ĉiutage vi volantas stari antaŭ via kara fornego por plia horo, kaj vi certe fariĝis eltenema kontraŭ varmo. Do en la kuirejo vi sentas vin eble malvarmete.” La patro refutis: “Vi ne envidu. Vi neniam povos percepti mian ĝojon en la laboro.”

Kian ĝojon? Mi ne scias. La fakto estis, ke ili refoje kverelis. La kverelo malhelpis min fini mian hejmtaskon kaj en la sekvanta tago mi devis fari la hejmtaskon ekster la klasĉambro. La hejmtaskon mi finis, tamen la novan lecionon mi preterlasis. Kia perdo!

Venis jen kelkaj aliaj kunportantaj ombrelon, pluvmantelon kaj vadbotojn. La kamaradoj ricevintaj la ombrelon k.s., montris grandan ĝojon kaj ilia skribado estis multe akcelata.

Mi pretervole rigardis eksteren kun espero vidi la patron aŭ patrino. Tamen mi klare sciis, ke mia espero restos vana, neniu venos por porti al mi ombrelon.

Estus bone, se miaj gepatroj ne kverelus.

La patro estas tre okupita, tamen li ĉiam estas kontenta. Male la patrino ĉiam plendas ke la vivo estas enuiga, kvankam ŝi havas multe da liberaj horoj. Kia vivo estas interesa? La patro revenas malfrue, enlitiĝas frue, kaj nur la patrino havas tempon por televidi. Mi kaj mia frato povas nur aŭskulti televidan programon en alia ĉambro, ŝajnigante nin sidantaj super la libroj. Se mi povus ĉiutage televidi, mi certe ne plendus, ke la vivo estas seka.

La vento kvietiĝis, sed pli kaj pli fortiĝis la pluvo. La plorsalikoj staris kun longaj haroj, kun vergoj plenaj de akvogutoj flagrantaj kiel sennombraj metalaj ĉenoj. Klinante la kapon, la salikoj tramalsekigitaj montriĝis kompatindaj.

Hieraŭ vespere la patro diris, ke li estis salajrita kaj li devas doni al la avo dek ĵuan-ojn. Sed mia patrino grumblis: “Nekovrebla ŝuldo! Ĝis kiam ni povos plenigi la senfundan sitelon!” La patro ekflamiĝis kaj ili refoje kverelis ĝis profunda nokto.

Mi neniel povis kompreni, ĉu ni ŝuldis al la avo?

Matene la patrino foriris sen manĝi, kaj la patro sendis min doni al ŝi panon. Sed la patrino diris al mi: “For! Ĉu vi nigrigas min?” Tagmeze la patrino ne venis hejmen, probable ŝi iris al sia patrino.

La pluvo fariĝis pli forta kaj la gutoj krakis frapante la fenestrajn vitrojn. La pluvakvo senĉese fluis malsupren kaj restiĝis multajn spurojn, similajn al la senĉesaj larmoj.

Mi ekmemoris la ploreman fraton. Post nelonge mi devas iri reporti lin hejmen, kaj mi devas bone konservi mian jakon, por



ke ĝi ne estu malsekigita de pluvo, ĉar mi bezonas ŝirmi la frateton per la jakon.

Matene la patro eliris sen preni pluvmantelon. Nun li eble intense laboris antaŭ la forno. La langoj de la fajro en la forno brue dancas, kaj la ŝvito fluas sur la vizaĝoj de mia patro kaj liaj kamaradoj, kiel kontinua pluvakvo. . .

Eksonis sonorilo por fino de leciono. La sonorado estis tiel malagrabra, kiel la pluvo.

La kamaradoj donis siajn paperojn kaj foriris unu post alia kunportante mantelon aŭ ombrelon. Mi daŭre sidis sur la benko fiksante la rigardon sur mia papero. Mi respondis nur malmulte de la demandoj.

“Ŝjaŭ Ŭang, Ŝjaŭ Ŭang,” mi aŭdis la vokon de la patro.

Mi pafiĝis de sur la seĝo kaj vidis, ke mia patro staras ĉe la pordo de la klasĉambro, anhelante, kun ombrelon en unu mano kaj miaj vadbotoj en la alia.

Mi kuregis al la pordo kaj preskaŭ faligis la tablon. Mi stuporiĝis antaŭ mia patro tute malsekigita. Akvo fluis malsupren sur lia pantalono, kaj la akvo amasiĝis

(Daŭrigo de p. 24)

A: Kiu estas fraŭlino Maria?

C: 我就是。

C: Wǒ jiùshì.
mi est-

C: Mi estas.

A: 这位先生是谁?

A: Zhèwèi xiānsheng shì shuí?
tiu ĉi sinjor- est- kiu

A: Kiu estas tiu ĉi sinjoro?

B: 他是我的朋友，鲍尔教授。

B: Tā shì wǒde péngyou, Bàoěr jiàoshòu.
li est- mia amik-, Paŭlo profesor-

B: Li estas mia amiko, profesoro Paŭlo.

A: 认识您很高兴。

A: Rènshi nín hěn gāoxìng.
kon- vi tre ĝoj-

A: Estas granda ĝojo konatiĝi kun vi.

D: 我也很高兴。

D: Wǒ yě hěn gāoxìng.
mi ankaŭ tre ĝoj-

D: Ankaŭ mi tre ĝojas.

A: 对不起，打扰你们了。

A: Duìbuqǐ, dǎrǎo nǐmen le.
Pardonon, ĝen- vi

A: Pardonon, mi ĝenis vin.

C: 没关系。

C: Méi guānxi.
ne grav-

C: Ne gravas.

Klarigoj;

1. 姓名 (nomo): La nomo de la ĉinoj konsistas el du partoj: la familia nomo antaŭe kaj la persona nomo poste. Plejparto de la ĉinaj familiaj nomoj konsistas nur el unu ideografiaĵo, kaj tre malmultaj el du. La persona nomo konsistas el unu aŭ du ideografiaĵoj.

2. 您贵姓 (kia estas via familia nomo): “您贵姓” estas ĝentila demandmaniero de “你姓什么” (kio estas via familia nomo), kaj havas saman sencon kiel tiu ĉi. Kaj oni respondas nur la familian nomon.

3. 您叫什么名字 (kiel vi nomiĝas): “名字” havas du sencojn — unu signifas nur personan nomon kaj la alia familian kaj personan nomojn. Ordinare oni aludas la duan sencon, tial estas konvene respondi la familian kaj personan nomojn, kiam oni demandas.

4. 没关系 (ne gravas): Kiam iu esprimas pardonpeton, maltrankvilon aŭ bedaŭron al alia, ĉi tiu diras “没关系” por trankviligi tiun. Ĝi signifas “faciligu la koron”, “ne maltrankviliĝu” ktp.

5. 哪位是玛丽小姐 (kiu estas fraŭlino Maria): “哪位” estas ĝentila dirmaniero de “谁”. Ĝenerale oni demandas: “谁”.

6. 我就是 (mi estas): La kompleta frazo estas “我就是玛丽” (mi estas Maria). “就是” signifas, ke ja estas...

sub liaj piedoj. Sur lia kapo rebriletis akveroj, kaj la akvo gutis de sur liaj frunto, tempioj kaj mentono.

Mia patro venis ne ŝanĝinte la vestojn.

“Rapidu, iru al via frato.”

Mi klinis min por ŝanĝi la

ŝuojn kaj miaj larmoj falis sur la ŝuojn. Mi rapide viŝis la okulojn. Kiam mi rektigis min, la amaraj kaj adstringaj larmoj fluis en mian buŝon. Ekondiĝis en mia koro: Mi ne bone respondis sur la papero, kaj mi ne meritis la prizorgon de la patro.

La patro iris en la pluvon tiran-

te min per lia malvarma mano. La salikoj fariĝis pli verdaj. Mi vadis en la pluvakvo. Pluveroj frapis la ombrelon kiel tamburon. Mi etendis la manon en la pluvon kaj prenis kelke da pluveroj kaj metis la manon al la buŝo. Mi sentis, ke la pluvakvo estis dolĉa kiel pruna bombono.

KIEL SPORTAS KAMPARANOJ DE ŜANDONG?

Fotoj de HŬO ĜJANJING



Motorcikla prezentado en kamparana sport-kunveno en Laj'u

La Ŝandong-anoj estas konataj kiel gigantuloj pro sia alta staturo kaj bona sano. Hodiaŭ la Ŝandong-anoj pli kaj pli fortiĝas dank' al konstanta pliboniĝo de la vivo kaj praktikado de sporto.

La loĝantoj de Ŝandong-provinco vivas ĉefe en la kamparo. Laŭ nekompleta statistiko, pli ol duono de la 90 000 vilaĝoj stariĝis junulan domon aŭ kulturen centron kun sportejo kaj gimnastikiloj. Tie estas 19 391 diversaj sportaj teamoj. La kamparanoj praktikas diversajn sportojn, kiaj montogrimpado, atletiko, luk tarto, korbopilko, flugpilko, tablotenis kaj volanludo. En 1984 la kamparanoj de la vilaĝo Ŭangŝe-jenĝuang en la suda antaŭurbo de Ĝjnan, la ĉefurbo de la pro-

vinco, investis 3.5 milionojn da jŭanoj por konstrui kulturen kaj sportan centron. Jen unu el la 10 ĉefaj sportaj novaĵoj de la jaro.

TAGO DE MONTGRIMPADO

Tajŝan-monto en la mezo de Ŝandong, 1 524 metrojn super la marnivelo, aspektas impone. Post la jaro 200 a.K., la ĉinaj imperiestroj konstruigis sur la monto templojn, preĝejojn kaj monumentojn por si. Nun ĉie sur la monto videblas historiaj objektoj, kvazaŭ ili estus ĉinaj kulturaj trezoroj montrataj en muzeo.

La tieaj loĝantoj havas kutimon surgrimponti monton en printempo kaj la 12-a de marto estas

tia tago. Je la 5-a matene sen nombraj kamparanoj kolektiĝis ĉe la piedo de la monto kaj poste gaje grimpis al la supro de la monto.

Inter la grimpantoj estis mezaĝa virino, kiu en flordeseĝna vaita vesto altiris al si atenton de multaj homoj. Ŝi estas 40-jara kamparanino, ŝi nomiĝas Liŭ Ĉuanjing. Mi demandis ŝin, por kio ŝi grimpas. Ŝi rakontis jenan interesan historieton.

Antaŭ tre longe iu bela virta virino transloĝiĝis de malproksima loko al la piedo de Tajŝan-monto. Ŝi instruis al tieaj virinoj sian eminentan metiarton kaj helpis ilin forigi malfacilojn kaj ĉagrenojn. Ŝiaj saĝo kaj bonkoreco kortuŝis la Ĉielon kaj ĉi tiu hono-



Virina pezgloba finalo en sport-kunveno en Laj'u

ris ŝin per la titolo Diino de Taj-ŝan, por ke ŝi defendu la pacan vivon de la tieaj virinoj.

Liŭ Ĉuanjing diris, ke en ŝia infaneco ŝiaj avino kaj patrino surgrimpis la monton dufoje ĉiujare. Ili oferis al la Diino de Taj-ŝan la incensojn, kiujn ili aĉetis per ŝia mono ŝparita por florde-segna ĉemizo. Tamen, ĉiufoje post ilia hejmenreveno la familio ankoraŭ suferis malsaton kaj malvarmon kiel antaŭe.

Nun Liŭ Ĉuanjing ne plu ĉagreniĝas pro manko de manĝo kaj vestoj. Ŝi grimpas nur por ekzerci sian korpon.

Iu 64-jara grimpanto diris al mi, ke anstataŭ fari kamplaboron li feliĉe pasigas tagojn hejme. Por plilongigi sian vivon, li surgrim- pas la monton unufoje kelktage. Antaŭ nelonge li aliĝis al la mon-

togrimpa grupo organizita de la Montogrimpa Asocio de Maljunuloj. Montrante pli ol 10 firmpa- ŝajn maljunulojn kun grizaj haroj ĉe la tempioj, li diris, ke ankaŭ ili estas membroj de la monto- grimpa grupo.

LUKTARTA DOMO EN KAMPARO

En la historio de Ĉinio la urbe- to Dengĝoŭ de la gubernio Peng- laj en Ŝandong estis loko kun multaj elstaraj luktartistoj. En Dengĝoŭ originis *Tanglang* kaj *Ĉangĉjŭan*, ĉefaj specoj de la ĉina luktarto.

En la pasinteco la riĉaj familioj de Ĉangju-vilaĝo lernis luktarton ĉe majstroj, dum la malriĉaj nur povis ŝtele lerni apude, kiam la antaŭaj sin ekzercis en luktado. De post 1979 la agrikulturo kaj kromokupoj de la vilaĝo rapide disvolviĝis, ĉirkaŭ 100 familioj enspezis po pli ol 10 000 jŭanojn. Ili investis kapitalon por konstrui amuzejon kaj klubon. En julio 1984 ili fondis la Dengĝoŭ-an Luktartan Domon per pli ol 100 000 jŭanoj investitaj de ili.

La luktarta domo allogis inte- resiĝantojn de diversaj lokoj. Inter ili estas kadroj, soldatoj, ofi- cistoj, laboristoj, lernantoj kaj ge- filoj de kamparanoj. Nun la lukt- arta domo akceptis la unuajn 120 lernantojn. Ili lernas en kvar grupoj la lokajn tradiciajn lukt- artojn *Tanglang* kaj *Ĉangĉjŭan*. Por lerni luktarton salajrulo de- vas pagi 8 jŭanojn por unu mo- nato kaj lernanto nur 5 jŭanojn. Post tri jaroj oni ellernos ses kompletojn da luktartoj kaj du specojn kun bataliloj. La trejni- toj estas famaj luktartistoj de la loko.

En la vilaĝo Ŭangzibuhoŭ de la gubernio Lajŝji estas privata luktarta domo kaj ĝia estro estas

la 34-jara virino Han Mejŝjang. Ŝia patro Han Mingjaŭ estis fama loka trejnisto. En sia infaneco ŝi eklernis luktarton de la patro. Ŝi ellernis la luktartojn *Singji*, *Bagŭa*, *Tongbej* kaj *Ĉangĉjŭan* kaj ĉ. dek specojn de luktartoj kun bataliloj. En 1969 ŝia patro mor- tis pro malsano. Ŝi decidis he- redi la patrajn luktartojn kaj ko- mencis trejni sian 4-jaran filinon. En malpli ol tri monatoj ŝia filino jam ellernis iujn fundamentajn luktmovejojn. Kiam ŝi trejnis la filinon, nemalmultaj infanoj ri- gardis ilin apude. Jen venis al ŝi en la kapon ideo fondi privatan luktartan domon. En junio 1984 ŝi starigis senpagan luktartan do- mon kaj akceptis 16 lernantojn, el kiuj la plej aĝa estis 8-jara kaj la plej juna 4-jara.

Tian ekzercadon akompanas ĉiam instrumentoj. Sed Han Mej- ŝjang ne estis riĉa. Ŝi ne povis aĉeti kompleton da instrumentoj por luktarto. Pro tio ŝi kaj ŝia edzo mem faris malgrandajn lig- najn ponardojn kaj bastonojn kaj malgrandajn sablosakojn kaj balancilojn. Han Mejŝjang devas plenumi ne nur dommastruma- don, sed ankaŭ laboron en duon- hektara kampo kune kun sia edzo. Tamen ŝi ĉiutage elspezas du horojn por instrui al la infa- noj luktarton. Nun tiuj malgran- daj lernantoj jam ellernis iujn simplajn duopajn ludmovejojn kaj fundamentajn ekzercojn de lukt- arto. Post la fondiĝo de la lukt- arta domo ŝi preskaŭ ĉiutage ri- cevis 2-3 leterojn de tiuj, kiuj deziras lerni. Tre multaj vizitis ŝin por la sama celo. Nun Han Mejŝjang estas membro de la Luktarta Asocio de la gubernio.

KORPOKULTURO DE INFANOJ

Triono de la 1 012 infanĝarde- noj de la gubernio Jeŝjan en Ŝan-

dong starigis siajn malgrandajn korbopilkan, tablotenisan, ŝakan, *vejči*-an kaj luktartan teamojn, La ceteraj laŭeble altiris infanojn al sporto kombinita kun ludo.

La infana korbopilka teamo de la infanĝardeno Ŝjibej de la urbe-to Ŝjijoŭ famiĝas tra la gubernio. Ĝi fondiĝis en 1973. La 30-jara afabla instruistino U Jueĝang trejn-is la teamon. Kiam mi venis al la infanĝardeno, iris streĉa konkurso en la sportejo. Ludis gekna-boj kaj iliaj trafoj ricevis man-klakadon de la rigardantoj. Estas tre interese, ke juĝisto estis mal-ppli-ol-10-jara triaklasa lernanto. Lia seriozeco ridigis la rigardan-tojn kaj ricevis ilian laŭdon.

Instruistino U diris al mi, ke la starigo de la korbopilka teamo postulis penigan laboron de ŝi kaj ŝiaj du kolegoj. Ili laŭpropor-cie malgrandigis la golejon kaj la ludkampon, aĉetis malgrandajn korbopilkojn kaj ellaboris kon-kursajn regulojn por infanoj. Ekzemple, estas permesite por in-fanoj kuri kelke da paŝoj kun pil-ko kaj organizi teamon el gekna-boj.

Estas elstara la luktarta teamo de la Okcidenta Infanĝardeno sur

la strato Hoŭljuji. Ĝiaj du junaj trejnistinoj estis bonegaj lernan-tinoj de la Postleciona Sporta Lernejo por Geknaboj en la urbo Jantaj. Ili amas la infanan kor-pokulturan edukon. En 1985, kiam fondiĝis la luktarta teamo, ili faris malgrandajn lignajn gla-vojn, bastonojn kaj spadojn. Nun pli ol 30 membroj de la teamo jam lernis kompletajn luktartojn de memelektita bastono, spado aŭ glavo kaj kelkajn duopajn ekzer-cadojn kun bataliloj. En prezen-tada kunveno la infanoj en bril-koloraj luktartistaj kostumoj fa-ris belan prezentadon.

SPORTKUNVENO DE KAMPARANOJ

En la sportejo de la Unua Mezlernejo de la urbo Laj'u iris sportkunveno partoprenata de 877 kamparanoj el 14 subdistrik-toj de la urbo.


Tuj kiam la signalisto donis pafon, ekmarŝis kamparanoj en diversaj sportistaj kostumoj. En la lastaj jaroj Ĉinio prenis mar-ŝon kiel oficialan konkursan sportobranĉon. Tamen la tieaj kamparanoj delonge ekzercas sian korpon per marŝo. Ili tiel faras ĉiaokaze: kaj survoje al

kampo aŭ foiro kaj dum trans-portado. En tiu sportkunveno estis virina 400-metra kaj vira 800-metra marŝoj. Iuj kampara-noj, kiuj unufoje partoprenis en la konkurso, ofte malobservis konkursajn regulojn. En la kon-kurso iuj marŝantoj ne volontis postiĝi kaj ekkuris, tiam juĝisto tuj avertis ilin kaj ne donis al ili seriozan punon. Por tiuj kamparanoj oni ne povis ne mil-digi la regularon.

En la sportkunveno estis ankaŭ familia 400-metra stafetkurado. Kaj ĉiu grupo konsistis el tri aŭ kvar samfamilianoj. La partopre-nantoj kuris malsamajn distan-cojn laŭ sia forto. Oni juĝis nur laŭ ilia rapideco.


En la kurejo estis 64-jara mal-junulino kun blankaj haroj, kiu altiris atenton de la rigardantoj. Ŝi kaj ŝiaj bofilino Ĝjang Cuj-dong kaj 16-jara nepo partopre-nis en familia 400-metra stafet-kurado. Pro sia maloportuna aĝo ŝi pretis kuri nur 40 metrojn. Tuj kiam eksonis la signala pafo, ŝi rapide startis. Rigardante ŝian kuradon, oni ne povis kredi, ke ŝi estas 64-jara. Fine, ŝia grupo gajnis la unuan lokon de la stafetkurado.

Han Mejšjang instruas infanojn.



Saka konkurso inter maljunaj kamparanoj de Henan-vilaĝo en Zibo, Sandong-provinco





CAŬ BAJLONG:

POSTEULOJ DE GARNIZONANOJ ANTAŬ

Antaŭ 220 jaroj 1 000 sibonaciaj soldatoj kaj iliaj pli ol 2 000 familianoj ekiris de la nuna Ŝenĝang. Ljaŭning-provinco, la Nordoriento de Ĉinio. Malgraŭ varmego en somero kaj frostoj en vintro de Gobio, la trupo iris unu jaron kaj atingis Jili de Ŝinĝjang en okcidenta Ĉinio, venkinte malfacilojn sur la vojo de pli ol 5 000 kilometroj. Tie ili garnizonis, kaj neniam hejmen revenis pro la longa vojo kaj malkvieta situacio. De tiam forpasis multaj jaroj kaj iliaj posteuloj enradikiĝis en Ŝinĝjang. Hodiaŭ la sibooj jam fariĝis unu el la membroj de la dekelk-nacia familio de Ŝinĝjang. Por koni ilian legendan travivaĵon mi vizitis la lokon antaŭ nelonge.

MALFACILA EKSPLUATADO DE VIRGA TERO

En Jining mi estis informita, ke la Siboa Aŭtonoma Gubernio Ĉapĉal je 50 km. sude de la urbo Jining ja estas la loko ekspluatita de la antikva landlima garnizono.

Mi veturis suden laŭ la ŝoseo. Trapasinte stepon riĉan je bovoj kaj ŝafoj kaj pontegon super Jilivivero, mi atingis Ĉapĉal post malpli ol unu horo. Tie kreskis altaj poploj ambaŭflanke de la larĝaj stratoj. Ambaŭflanke de la stratoj estis multaj butikoj, kaj sur la trotuaroj alvokis etvendistoj de surbastonetaj rostitaj ŝafaĵoj, akvomelonoj, melonoj, pomoj k.a. Sur la vojo cirkulis aŭtoj, bicikloj kaj azen-ĉaroj. Vere mal-

granda tamen vigla gubernia urbo.


En la ofidomo de la Gubernia Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio mi vizitis Ŝjaŭ Ĉang, respondeculon de la Konstanta Komitato de la Gubernia Popola Kongreso. Liaj prapatroj ja estis militistoj de la tiama garnizono. Li konigis al mi la historion de la siboa nacio kaj ĝian pioniran laboron.

La sibooj estas posteuloj de la ĉina antikva nacio ŝjanbej. Antaŭe ili loĝis en Hejlongĝjang-provinco, nordoriente en Ĉinio, kaj sin vivtenis ĉefe per ĉasado kaj fiŝado. Post kiam njuĝeng-oj, prapatroj de la manĉuroj, regantoj de Ĉing-dinastio (1644-1911



*Safaro sur stepo de
Capcâl-gubernio*

*Ludo de balancilo
ŝatata de la sibooj*



Juna patrino kantas lulkanton.

220 JAROJ

Fotoj de ŬANG DEGJUN


p.K.) venkis siboojn, ili ludis la rolon de potenca trupo sub la komando de la manĉuraj regantoj. Ĝiaj lingvo, moroj kaj kutimoj tre similas al tiuj de la manĉuroj. Meze de la 18-a jc. ribelo okazis en Jili. Por firmigi sian regadon en la nordokcidento de Ĉinio la kortego de Ĉing-dinastio sendis la siboojn al Jili en 1764 p.K.

En Jili la sibooj garnizono ne submetiĝis al la frosto kaj trosekeco de la loko. En 6 jaroj ili fosis kanalon 90 km. longan por enkonduki akvon el la rivero Jili al la stepo kaj iom poste pretigis 5 000-hektaran rizejon. Ekde tiam ili povis ne nur provizi sin per la produktitaj grenoj, sed an-





Malgrandaj siboaj pajistoj



Ĉiujare en la 18-a de aprilo la siboaj festas la Feston de Okcidenten-transloĝiĝo. Jen oni preparas festan piknikon.

kaŭ helpi aliajn lokojn per la superfluaĵoj, pro tio oni honoris la lokon "grenejo de Norda Ŝinĝjang". Tie estas herboriĉaj montodeklivoj, taŭgaj al paŝtado, pro tio la tiea brutobredado estas evoluinta. La prosperaj terkulturo kaj brutobredado grandigis la siboan nacion de 3 000 membroj al 17 000.

LA NACIA KULTURO DE SIBOOJ

Ĉing-dinastio, pereinta antaŭ 74 jaroj, estis fondita de la manĉuroj, unu el la ĉinaj nacimalplimulto. Ĝi estis ankaŭ la lasta feŭda dinastio en la ĉina historio. Ĝia oficiala lingvo — la manĉura lingvo jam fundamente malaperis en Pekino, ĝia antaŭa ĉefurbo, kaj Ĝjilin kaj Ljaŭning, ĝiaj hejmlokoj, sed la sibooj, loĝantaj en Ĉapĉal, malproksime de la

manĉuraj hejmlokoj, hodiaŭ ankoraŭ parolas kaj skribas en la manĉura lingvo. Ili eldonas sian ĵurnalon en la manĉura lingvo, unikan en tiu lingvo de Ĉinio. Ili tradukis nemalmultajn klasikajn kaj literaturajn verkojn el la hana lingvo en la manĉuran. Ili verkis multajn literaturajn verkojn, spegulantajn sian nacian vivon, ekz. "Kanto pri la Hejmloko", "Transloĝiĝo al la Okcidento", poemon "Ĉasado" spegulantan la vivon kaj laboron de la sibooj en la antikveco. Nun en Pekino, Ŝinĝjang kaj aliaj lokoj laboras siboaj filmaj reĝisoroj, kantistoj, lingvistoj, kuracistoj kaj inĝenieroj venintaj de Ĉapĉal.

En la komencaj jaroj de sia fiksloĝiĝo en Ŝinĝjang, la sibooj ne bezonis pagi imposton en terkulturado, krom militservi en la

armeo. Fakte ili vivis aŭtonoman vivon. Iliaj religioj ŝamanismo kaj lamaismo malpermesis al siaj adeptoj geedziĝi al membroj de alia nacio. Ilia loĝloko norda Ŝinĝjang estis dezerta kaj cetere iliaj vilaĝoj estis ĉirkaŭitaj per muroj, kio malhelpis ilian kontaktiĝon kun la ekstera mondo kaj aliflanke favoris al konserviĝo de iliaj moroj, kutimoj, lingvo kaj kulturo.

La siboa garnizono donis grandan atenton al kulturo kaj edukado. Atinginte Jili, ili fondis ses tribojn ĉiu kun senpaga lernejo de la lingvoj hana kaj manĉura. Post kiam naskiĝis la nova Ĉinio, la sibooj disvolvis siajn tradiciojn de bona edukado. Nun en la gubernio funkcias 14 mezlernejoj kun pli ol 7 000 lernantoj diversnaciaj. Tie la mezlerneja klereco estas fundamente po-



Sibolingva presaĵo en Ĉapĉal-gubernio

pularigita. En Ŝinĝjang la sibooj ĉiam gajnis kompare bonajn sukcesojn en la eniraj ekzamenoj por la superaj lernejoj.

ŜATO AL ARKPAFADO


Jam antaŭ pli ol mil jaroj la sibooj ekŝatis arkpafi. En la antikveco la sibooj sin vivtenis per ĉasado kaj fiŝado. Garnizonante ili prenis pafarkon kiel unu el la ĉefaj armiloj. Tiel fariĝi elstara arkpafisto estas granda gloro por ĉiu siboa viro. La sibooj pendigas pafarketon el ruĝa silka ŝnuro kaj mallarĝa lato sur la novnaskiton tuj ĉe ĝia naskiĝo, por peti benon de la Dio, ke la bebo plenkreskinte fariĝu elstara arkpafisto. Poste arkpafado fariĝis pli kaj pli malgrava en la batalo, tamen la antikva moro daŭre influas la junajn siboojn. Nun arkpafado estas ilia ŝatata sporto. Ĉe

ĉiuj gravaj festoj ili konkuras en arkpafado. Antaŭe ilia celtabulo estis farita el ledoj kaj felto, kun ruĝa centro kaj blua, flava, verda kaj nigra cirkloj ĉirkaŭe. La sagoj senescepte estis sonantaj. La sag-pintoj estis el bova korno kun kvar truetoj. En la lastaj jaroj oni uzas arkojn kaj sagojn normajn por oficiala sporta konkurso. En Ĉinio la sibooj ĝuas renomon en arkpafado. Ĝŭo Mejĝen kaj Ĵu Gŭang, amatoraj sibooj pafistoj, gajnis premiojn en la enlandaj kaj internaciaj konkursoj. En 1980 Ĝŭo Mejĝen rompis arkpafan olimpikan rekordon en la Azia Arkpafa Ĉampioneca Konkurso okazinta en Hindio. Ĝŭo Mejĝen kaj Ĵu Gŭang en la konkurso en Irlando gajnis ĉampionecon virinan kaj viran respektive.



Gŭo Mejĝen sur pafkampo

Lerta pafisto Ĵu Gŭang



**LA ĈINA REGISTRARO
DECIDIS REDUKTI LA
NOMBRON DE SIAJ
ARMEANOJ
JE MILIONO**

En la plivastigita kunveno de la Centra Milita Komisiono en la 4-a de junio Deng Ŝjaŭping, prezidanto de la komisiono, deklaris en la nomo de la ĉina registaro, ke la Ĉina Popola Liberiga Armeo reduktos la nombron de siaj anoj je miliono.

En la kunveno Deng Ŝjaŭping analizis la aktualan internacian situacion, pritraktis la eksteran politikon de Ĉinio kaj klarigis la motivon kaj signifon reformi la sistemon kaj redukti la personaron de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Li emfazis, ke ĉar Ĉinio volas meti grandan forton sur sian ekonomian konstruadon kaj turniĝi en modernan socialisman potencon, ĝi bezonas pacan medion kaj klopodas krei kaj defendi tian medion. La ekonomia konstruado estas ĝenerala situacio kaj ĉio devas submetiĝi al tiu situacio.

Li diris, ke la decido montras, ke Ĉinio volas per sia ago kontribui al defendo de la mondpaco.

La kunveno decidis laŭvice kaj laŭpaŝe efektiviĝi la reduktiĝon en la venontaj du jaroj.

**ĈINA EDUKA SISTEMO
REFORMATA**

La ses-taga tutlanda eduka konferenco okazinta en majo en Pekino diskutis la decidon de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri reformo de la eduka sistemo kaj ellaboris paŝojn kaj rimedojn por tiu reformo.

La decido montris, ke la ĉefa celo de reformo de la eduka siste-



Deng Ŝjaŭping deklaras, ke la ĉina armeo reduktos la nombron de siaj anoj je miliono.

mo estas levi la kvaliton de la nacio kaj kulturi pli da dezirindaj kapabluloj; praktiki naŭ-jaran devigan edukon kaj la principon "lokaj registaroj respondecu pri la fundamenta eduko kaj diversnivelaĵoj prenu sur sin administradon" estas grava paŝo por disvolvi la ĉinan edukon aferon kaj reformi la ĉinan edukon sistemon. La decido ankaŭ postulas restrukturi la mezgradan edukon, energie disvolvi profesian edukon, ŝanĝi la planon pri akcepto de lernantoj en altlernejoj kaj la sistemon pri postenigo de diplomitoj kaj doni pli grandan rajton al altlernejoj funkciigi kursojn.

**TUTE PLASTA MIKROAŬTO
FARITA EN PEKINO**

Lastatempe oni ekspertizis en Pekino novan mikroŝarĝaŭton de tipo BS-111. Fakuloj opinias, ke tio ne nur plenigis breĉon de la ĉina aŭtoindustrio, sed ankaŭ estas originala projekto en la evoluo de modernaj aŭtoj.

La tute plasta kaj tutpezsubtena mikroaŭto sin karakterizas per sia malpezeco, ekonomia konsumo de brulaĵo, malgrandaj bruo, tremo kaj polucio. Ĝi jam elportis 25 000-kilometran provveturadon. Ĝia difektiĝo

estas multe malpli serioza ol tiu de alispecaj aŭtoj kaj tio montras ĝiajn bonajn amortizemon kaj adaptiĝemon.

Produkti tian tute platan aŭton postulas multe pli simplan teknikon, tiel ke oni povas ŝpari investaĵojn kaj instalaĵojn. Kaj krome oni povas ankaŭ laŭbezone ŝanĝi la aspekton kaj formon de la aŭto kaj mane labori en ne tre bonaj kondiĉoj. Tio estas reformo en la historio de aŭto-farado.

**PLI OL 15 000 TEKNIKAJ
FRUKTOJ EN FOIRO**

De la 15-a de majo ĝis la 7-a de junio okazis en la Pekina Ekspoziciejo la unua tutlanda foiro de teknikaj fruktoj, la plej granda post la fondiĝo de la popola respubliko.

Estis 78 foiristaj grupoj konsistantaj el pli ol 3 000 organizoj de diversaj landpartoj, kun pli ol 15 000 teknikaj fruktoj kaj pli ol 550 invitoj por malfacilaj kontrakt-proponoj. Dum la foira tempo oni ne nur energie disvolvis komercan aktivadon kun urbaj kaj kamparaj entreprenoj kaj institucioj, sed ankaŭ organizis inviton por kontrakt-proponoj, laŭkontraktan laboron aŭ kuran entreprenadon en la flankoj de ĉefa konstru-

ado, teknika reformo, teknika disvolviĝo kaj fabrikado de akcesoraj instalaĵoj por importitaj maŝinoj, kiuj ankoraŭ ne estis efektivigitaj laŭplane de provinco, subprovinco kaj gubernio.

KRUDMATERIALO EL SKORIO

La Ŝtala Kompanio de Panĝi-hŭa, Siĉŭan-provinco, plene utiligis vanadan kaj titanon magnetitan kaj atingis rimarkindan ekonomian efikon. La kompanio ne nur produktas pli ol 1 500 000 tunojn da ŝtalo jare, sed ankaŭ servigis la skorion kiel valoran krudmaterialon de novaj produktaĵoj. Kaj tio plimultigis la enspezon kaj solvis la problemon de tropleneco de skoriejo.

ĈINIO ESTABLOS NOVAJN AGRIKULTUR-TEKNIKAJN CENTROJN

Ĉi-jare Ĉinio establos 26 guberniajn agrikultur-teknikajn centrojn. En la pasintaj jaroj ĝi jam starigis 392 tiajn centrojn, kaj, post la establiĝo de la novaj, 18% de la gubernioj de la lando havos tian centron.

Por akceli la aferon, iuj koncernaj gubernioj kune kun la ŝtato investas kapitalon por la konstruado kaj aliaj mem kolektas monon kaj materialon. Pasintjare Ĉinio konstruis 102 guberniajn agrikultur-teknikajn centrojn, el kiuj 54 estis konstruitaj de lokoj per ilia propra financa forto.

ANTAŬLERNAĜA EDUKO DISVOLVIĜANTA EN ĈINIO

En la lastaj jaroj rapide progresis la ĉina antaŭlernaĝa eduko. La statistiko ĝis la fino de 1984 diras, ke Ĉinio havas pli ol 66 000 infanĝardenojn kun pli ol 12 940 000 infanoj kaj pli ol 730 000 pedagogoj, 42.8% de la lastaj konsistigas diplomitoj de

La Ĉina Virina Flugpilka Teamo akceptas la mevo-pokalon.



mezgradaj instruistaj lernejoj kaj ordinaraj superaj mezlernejoj.

Nun la frutempa pedagogia eduko kaj disvolvo de infana inteligenteco pli kaj pli vekas atenton de multaj lokoj. La tuta socio kaj preskaŭ ĉiuj familioj komprenas la signifon de antaŭlernaĝa eduko pli bone ol antaŭe.

41 PORINFANAJ ĜARDENOJ KONSTRUITAJ EN FUĜJAN

En la lastaj jaroj oni konstruis 41 porinfanajn ĝardenojn en diversaj lokoj de Fuĝjan-provinco.

En la grandaj porinfanaj ĝardenoj estas ne nur ordinaraj, sed ankaŭ elektraj amuziloj, kiel elektraj movataj aviadiloj, ĉevaloj kaj paraŝutoj.

LA ĈINA VIRINA FLUGPILKA TEAMO GAJNIS MEVO-POKALON

Maje en Pekino okazis la Mevo-pokala Internacia Virina Flugpilka Konkurso. Venkinte la sovetian kaj japanan teamojn, la Ĉina Virina Flugpilka Teamo partoprenis en la finalo kun plej alta monda nivelo. Post kvin partioj de intensa lukto kun la kuba teamo ĝi gajnis la ĉampionecon. La duan, trian kaj kvaran lokojn okupis respektive la kuba, sovetia kaj japana teamoj.

KVAR TIBETANOJ SURGRIMPIS ĜŬOAŬJOŬ

Dek minutojn antaŭ la 18-a horo (Pekina tempo) de la 1-a de majo

Ranĉjen Puncog, Dajnzin Doge, Eta Dobĝej kaj Cering (tibetanoj), membroj de la Ĉina Tibeta Ĝŭoaŭjoŭ-grimpa Teamo, surgrimpis la supron de Ĝŭoaŭjoŭ, la sesan altan montpinton en la mondo, 8 201 metrojn super la marnivelo.

La nomita teamo estas la unua montogrimpa teamo konsistanta nur el tibetanoj, kaj tiu granda montogrimpado estis unuafoje organizita de Tibeto mem.

USONA PIANISTO EN PEKINO

S-ro Ozan Marsh, prezidanto de la Fonduso de Usonaj Pianistoj, vizitis Ĉinion en majo kaj junio laŭ invito de la Kultura Ministerio de Ĉinio. En la halo de la Centra Konservatorio li ludis verkojn de Chopin, Liszt kaj aliaj muzikaj majstroj, i.a. la unua piana koncerto en BE majora de Liszt estis akompanata de la simfonia orkestro de la Centra Opera Trupo de Ĉinio kaj direktata de Ĝeng Ŝjaŭjing. La prezentado ricevis longtempan manklakadon de la spektantoj.

S-ro Ozan Marsh faras prezentadon en Pekino.



MEMORU LECIONOJN DE LA MILITO, DEFENDU LA MONDPACON!

Pasis jam plenaj 40 jaroj post la fino de la kontraŭfaŝisma Dua Mondmilito. La milito estigita de la profunda kapitalisma krizo kaj provokita de la faŝisma akso Germanio-Italio-Japanio estis katastrofo senprecedenca en la homa historio kaj envolvis en sin pli ol 60 landojn kaj regionojn kaj kvar kvinonojn de la monda loĝantaro. Ĝi kaŭzis al la tutmondaj popoloj grandegajn detruojn kaj perdojn. La milito forrabis la vivon de pli ol 50 000 000 homoj, ruinigis multajn urbojn kaj vilaĝojn kaj cindrigis sennombrajn riĉaĵojn.

Malgraŭ ke la milito kaŭzis al la homaro malfeliĉegon, la historio ne regresis kaj la mondo disvolviĝis ne laŭ la volo de la agreŝantoj. Dank' al sia kontraŭfaŝisma alianco Sovetio, Ĉinio, Usono, Britio, Francio kaj aliaj landoj fine venkis la germanajn, italajn kaj japanajn agreŝantojn en la sangaj bataloj. La faŝisma reĝimo frakasiĝis unue en Italio. Nelonge poste ankaŭ la germanaj nazioj demetis la armilojn. Post kvar monatoj, t.e. en la 2-a de septembro 1945, la japanaj militaristoj deklaris senkondiĉan kapitulacion. Tiel la Dua Mondmilito finiĝis per la definitiva venko de la kontraŭfaŝisma alianco. La milito hardis kaj edukis la mondajn popolojn, donis al ili riĉan historian sperton kaj profunde influis la mondpacon kaj la homan progreson, tial ĝi havis tre gravan signifon.

Post la Dua Mondmilito granda ŝanĝiĝo okazis al la mondo.

Dank' al la peza bato al la imperiisma forto en la milito kaj vekigo de koloniaj kaj dependlandaj popoloj, la naci-liberiga movado en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko ŝtorme disvolviĝis, la imperiisma kolonia sistemo rapide disfalis kaj multaj subpremataj nacioj liberigitaj el sub la koloniisma jugo sendependiĝis kaj fariĝis mastroj de sia lando. Tio estis la plej granda ŝanĝiĝo de la internaciaj rilatoj post la milito kaj aliigis la ekvilibron de fortoj en la mondo kaj la internacian dispozicion, kaj la nove levigantaj landoj ludas pli kaj pli gravan rolon sur la scenejo de la monda historio.

La Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio estis grava konsistiga parto de la granda kontraŭfaŝisma milito. En la kontraŭfaŝisma batalo en Azio la ĉina po-

polo plej frue komencis rezisti kontraŭ la japanaj faŝismaj agreŝantoj kaj plej malfrue finis la batalon, suferinte grandegajn perdojn. Laŭ statistiko, en la rezistmilito viktimiĝis 18 000 000 ĉinoj kaj perdiĝis nekalkuleblaj havaĵoj. La ĉina popolo faris plej grandajn oferojn de la tuta nacio por venki la japanan militarismen kaj grandajn kontribuojn al la venko de la tutmonda kontraŭfaŝisma milito.

La Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio detenis, malgrandigis kaj atakis la forton de la tuta faŝisma klico. En la kvar jaroj antaŭ la eksplodo de la Pacifika Milito, Ĉinio unuope rezistis kontraŭ la japanaj imperiistoj kaj konstante detenis 70% kaj 50% de la fortoj respektive de la japanaj tera kaj aera armeoj. Post eksplodo de la Pacifika Milito du

Milicianoj en kontraŭjapana bazloko faras minojn.



milionoj da japanaj terarmeanoj estis ree implikitaj en la ĉina batalkampo. Laŭ statistiko, en la Kontraŭjapana Rezistmilito en la ĉina batalkampo estis mortigitaj kaj vunditaj 1 330 000 japanaj armeanoj.

La Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio multe helpis kaj subtenis la batalojn de la aliancitaj kontraŭfaŝismaj landoj en la diversaj batalkampoj. Post eksplodo de la Dua Mondmilito Hitler aneksis pecon kaj pecon da tero en Eŭropo, kaj Japanio intencis antaŭenpuŝiĝi suden, sed ne povis ne prokrasti la Pacifikan Militon, ĉar ĝiaj kotaj kruroj jam profundigis en Ĉinio. La eksplodo de la Sovetia-Germana Milito donis al Japanio ŝancon antaŭen puŝiĝi norden, sed Japanio ne aŭdacis ataki Sovetion pro la batalkampo en Ĉinio. Tio evitigis al Sovetio batalon kontraŭ malamikoj de ambaŭ flankoj kaj samtempe ebligis al ĝi tutforte rezisti kaj fine fiaskigi Hitler. Post eksplodo de la Pacifika Milito Japanio pro implikiĝo en agreso al Ĉinio kaj nesufiĉo de forto devigite nuligis sian planon ataki Aŭstralion kaj Cejlonon kaj forlasis sian intencon de arma kuni-



La Nova Kvara Armeo formita el popolaj gerilaj taĉmentoj sin direktas al orienta Ĉinio por krei tie kontraŭjapanan bazlokon.

niĝo kun Hitler en la Proksima Oriento kaj la Hinda Oceano. Unuvorte, ĝuste la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio frakasis la strategiajn planojn de la japana imperiismo, forte subtenis la aliancitajn kontraŭfaŝismajn landojn kaj grave influis la procezon de la Dua Mondmilito.


La Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio havis profundan in-

fluan sur forigon de la imperiismaj subjugigo kaj subpremo kaj akcelon de la koloniaj kaj dependlandaj popoloj al batalo por la ŝtata sendependiĝo kaj nacia liberiĝo. Kiel antikva kaj malforta orienta lando, Ĉinio longtempe suferis imperiisman agreson. La agreso de la japana imperiismo vekis fortan reziston de la ĉina popolo. La ĉina popolo brave kaj obstine daŭrigis la longan batalon kaj fine venkis la agresantojn. Sendube tio tre kuraĝigis la diverslandajn popolojn batalantajn kontraŭ agreso kaj subpremo, precipe antaŭenigis la batalojn de la koloniaj kaj dependlandaj popoloj de Azio.

La Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio estis tutnacia milito partoprenata de la demokratiaj partioj, laboristoj, kamparanoj, soldatoj, lernantoj, komercistoj kaj elmigrantaj ĉinoj, surbaze de la kunlaboro de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Kuomintang, sub la standardo de la kontraŭjapana nacia unuecfrento iniciatita de la Komunista Partio

La ĉina popolo tunelis por rezisti kontraŭ la agresantoj. Jen ĉina soldato iranta en tunelon.





En la aŭtuno de 1937 trupoj de la Oka-voja Armeo marŝis tage kaj nokte al la kontraŭjapana fronto en norda Ĉinio.

de Ĉinio; ĝi estis milito unuafoje kaj komplete gajnita de la ĉina popolo kontraŭ la alilanda agreso dum la lastaj pli ol cent jaroj.

La venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito oni ŝuldas al la penado de la tuta ĉina nacio. Sed ni devas montri, ke la Oka-voja Armeo, la Nova Kvara Armeo kaj la popolo en la kontraŭjapanaj bazlokoj gvidataj de la Komunista Partio de Ĉinio faris grandan kontribuon al la venko de la milito. En la okjara Kontraŭjapana Rezistmilito ili detenis kaj rezistis plejparton de la agresa japana armeo kaj preskaŭ la tutan pupan armeon kaj ekstermis pli ol 1 700 000 japanajn kaj pupajn armeanojn. Ili estis la ĉefa forto de la tutnacia rezistmilito.

La internacia helpo estis unu el la gravaj kaŭzoj de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio. Dum la rezistmilito ni ricevis subtenon kaj helpon de la popoloj de Sovetio, Usono, Britio kaj aliaj landoj. Por helpi la ĉinan popolon en ĝia rezistmilito, multaj eksterlandaj amikoj oferis sian vivon. Tion la ĉina popolo neniam forgesos.


40 jaroj jam pasis post la milito, sed hodiaŭ la mondo ankoraŭ

ne povas plene ĝui pacon kaj la internacia situacio ankoraŭ ne estas stabila. La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke la superpotencoj praktikas hegemoniismon. Por ĉasi hegemonion super la mondo, ili freneze konkuris en armado kaj faris tian konkuron en multaj lokoj de la mondo. Pli kaj pli akriĝis ilia lukto pro hegemonio, pro nuklea supereco. Ilia konkursofero de nuklea armado vastiĝis eĉ al la ekstera spaco kaj per tio ili metis la tutan homaron sub minacon de nuklea milito. Sekve preventi la danĝeron de nova milito kaj defendi la mondpacon fariĝis urĝa tasko por la tutmondaj popoloj.

Por preventi novan mondmiliton, ni devas ĉerpi la historiajn lecionojn: ni unuigu kontraŭ la danĝero de milito antaŭ la pretiĝo de la agresa forto; kaj ni devigu ĉiamaniere la agresantojn ĉesigi la lokan militon, post kiam ili jam lanĉis ĝin. Kaj nun, la diverslandaj popoloj devas leviĝi kontraŭ hegemonio kaj hegemoniismo kaj ĝustatempe haltigi kaj kontraŭbatali la agresan ekspansion kaj armado-konkuron de la superpotencoj, nur tiel paco povas esti atingita kaj milito malhelpita.

Kiel historia sperto montras, la venko de la kontraŭfaŝisma milito rezultis el tio, ke la kontraŭfaŝismaj fortoj transpaŝis la limojn de malsamaj ideologioj kaj soci-sistemoj kaj formis vastan kontraŭfaŝisman unuecfronton mondskalan. Hodiaŭ ni devas mobilizi la diverslandajn popolojn kaj unuigi ĉiujn unuigeblajn fortojn en la mondo por preventi novan mondmiliton. Kvankam nun ankoraŭ ekzistas danĝero de nova milito, tamen kreskas la forto malhelpanta tian militon. Hodiaŭ plejparto de la ŝtatoj ne volas militon. Se la tutmondaj pacamaj popoloj kune klopodas, ili povas efike defendi la mondpacon.

La ĉina popolo ĉiam amas pacon kaj oponas kontraŭ milito. Nun, kiam Ĉinio plenenergie entreprenas sian socialisman modernigan konstruadon, ĝi tre deziras kvietan internacian medion por longa tempo kaj sentas urĝan bezonon de paco. Ni bone scias, ke sen paco Ĉinio ne povos prosperi kaj progresi kaj nia popolo ne povos vivi riĉe kaj feliĉe. Tial la ĉefa celo de la ekstera politiko de Ĉinio estas defendi la mondpacon kaj batali kontraŭ hegemoniismo. Ĉinio estas grava faktoro de la forto de la mondopaco. Ĉiu progreso de Ĉinio en ĝia socialisma moderniga konstruado kreskigas la garantion de la mondopaco. Ni esperas, ke estonte ni povos kune kun la popoloj de la tuta mondo kontribui al plua grandigo de la forto de la mondopaco.



LA ARKIVA KONSERVADO DE ĈINIO

de FANG MING

La konservado de arkivoj en Ĉinio havas longan historion. Arkeologia prifosado konstatis, ke la plej antikvaj arkivoj nun ekzistantaj en Ĉinio estas tiuj kun skribaĵoj sur testudaj ŝeloj aŭ bestostoj en la periodo Jinŝang (la 16-a jarcento a. K. — ĉ. 1066 a. K.). La bone konservita antikva arkivo estas la grandioza librotenejo Imperiestra Arkivo, kiu estis konstruita en 1534 p. K.

Ediktoj de Ĉing-dinastia imperiestro konservataj en la Unua Historia Arkivo de Ĉinio




La librotenejo Imperiestra Arkivo en Pekino

el brikoj kaj ŝtonoj. Ĝi havas pli ol 150 grandajn ŝrankojn kun ediktoj de imperiestroj de la dinastioj Ming kaj Ĉing kaj iliaj familiaj arkivoj. Historiografoj de diversaj dinastioj kompilis historiajn librojn kaj kronikojn, uti-

ligante la arkivojn, kaj postlasis ekstreme valorajn kaj riĉajn heredaĵojn al la posteuloj.


La ĉina registaro alte taksas heredon kaj disvolvon de la eminenta kultura heredaĵo de Ĉinio kaj donas grandan atenton al la arkivoj kaj arkiva laboro. Ĝi oficiale deklaris, ke la arkivoj de la ŝtato estas raraj kulturaj kaj historiaj riĉaĵoj kaj la arkiva laboro estas grava parto de la scienca kaj kultura afero de la ŝtato. En la pasintaj pli ol 30 jaroj Ĉinio unuapaŝe starigis ŝtatskalan arkivan sistemon laŭ la principo koncentre administri la arkivojn kaj arkivan laboron kaj klasifiki ilin laŭ malsamaj niveloj kaj fakoj.

Ĉinio havas 2 900 arkivojn divers-nivelajn kaj divers-fakajn, el kiuj tri estas de la centra registaro. La Centra Arkivo konservas gravajn partiajn kaj ŝtatajn dokumentojn, ĝi estas centro de la ĉinaj revoluciaj kaj historiaj arkivoj. La Unua Historia Arkivo



de Ĉinio en la okcidenta flanko de la Imperiestra Muzeo en Pekino konservas pli ol dek milionojn da arkivaj materialoj de la centraj instancoj de la dinastioj Ming kaj Ĉing (de 1368 ĝis 1911). La Dua Historia Arkivo de Ĉinio en Nankino konservas arkivajn materialojn de la malnova registaro en la periodo de la Ĉina Respubliko de 1911 ĝis 1949. Iuj fakaj departementoj havas siajn fakajn arkivojn en certa skalo, kiaj la arkivoj urbo-konstrua, fota, diplomacia, geologia kaj filma, kaj faris specialan ordigon kaj utiligon de la arkivaj materialoj. La Domo de Ĉina Moderna Literaturo, iniciatita de Bakin kaj aliaj verkistoj kaj konstruita per ilia monhelpo, konservas manuskriptojn kaj diversajn eldonojn de literaturaj verkoj de Maŭdun, Bakin, Ĉaŭ Ju kaj multaj aliaj verkistoj.

La arkivo-konserva metodo en Ĉinio transiras de la tradicia manipula maniero al la moderna. Pliparto da arkivoj estas klimatisita kaj provizita per senhumidigiloj. Oni riparis preskaŭ ĉiujn historiajn arkivojn difektitajn de insekta mordo kaj ŝimo kaj mikrofilmis originajn arkivojn, por ke oni referencu nur filmitajn arkivojn per legaparato. Multaj grandaj arkivoj kompilas katalogojn kaj aktive partoprenas en kompi-




Aŭtomato aplikata en geologia arkivo

gajn kartojn por oportunigi komputilan deponon kaj arkivo-serĉadon.

La ĉinaj arkivoj praktikas la principon malfermi historiajn arkivojn kaj plenenergie disvolvas arkivo-utiligadon. Ili lego-ĉambroj akceptas arkivajn utiligantojn de diversaj lokoj, por ke ili legu, citu kaj kopiu. En la lastaj jaroj diversaj arkivoj liveris grandan kvanton da arkivaj materialoj al politiko, diplomatio, ekonomia konstruado, kulturo kaj edukado, scienca kaj historia esplorado. La koncernaj arkivoj kompilas kaj eldonas arkivajn materialojn kaj aktive partoprenas en kompi-

lado de lokaj kronikoj. Ili celas kolekti novajn historiajn materialojn per aperigo de la revuo "Historia Arkivo", kiu konigas historiajn materialojn pri arkivoj kaj esplorajn artikolojn pri la dinastioj Ming kaj Ĉing kaj la Ĉina Respubliko, tio vekis atenton ĉe ĉinaj kaj alilandaj historiistoj. En la unua n-ro de 1984, la revuo publikigis la nove eltrovitajn arkivojn pri la familio de Ĉaŭ Ŝjueĉin. La scienca kaj teknika arkivo farigis ĉiam pli grava en la moderna konstruado de Ĉinio. Parto de la arkivoj oferitaj de fama pontisto Maŭ Jiŝeng liveris fidindajn materialojn al la prospektado de subtera akvo-rezervo de Hangĝoŭ kaj donis ekonomian efikon.

La departementoj pri la ĉinaj arkivoj nun havas amikajn rilatojn kun pli ol dek landoj. La Unua kaj Dua Historiaj Arkivoj de Ĉinio akceptis 7 000-8 000 alilandajn fakulojn en la lastaj du jaroj. Dank' al tiuj aktivecoj plifortiĝis la amikeco kaj kunlaboro inter diverslandaj arkivistoj kaj popolanoj. Krome, la ĉinaj arkivistoj faris interŝanĝon kun ili en arkivaj laboro, sperto, tekniko kaj metodo.



En arkivo de Sاندong-provinco

Pri la Internacia Kajta Festivalo en Ŭejfang

Informiĝinte, ke okazos la Dua Internacia Kajta Festivalo en la urbo Ŭejfang de Ŝandong-provinco, mi pretervole rememoris rigardadon, faradon kaj flugigon de kajtoj en mia infaneco en la hejmvilaĝo. Ĉiujare en marto kaj aprilo, kiam verdiĝis la salikoj, ekfloris la persikujoj kaj ridetis la ruĝa suno en la ĉielo, ni en printempaj vestoj kuris kiel hirundoj al la sino de la naturo kaj per longaj ŝnuroj flugigis kajtojn en formoj de hirundo, libelo kaj papilio. Kia printempa viveco!

Kajto, nomata papera aglo en la antikva Ĉinio, havas historion de pli ol 2 000 jaroj. Laŭdire, la plej fruaj kajtoj estis uzataj en milito kaj scienca esplorado. La unua ĉina kajto estis farita de lerta metiisto en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770—476 a. K.). Li faris malpezan lignan aglon. Post tio, iu fama generalo de Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.) utiligis kajton por mezuri la distancon ĝis malamika pozicio. En Tang-dinastio (618—907 p. K.) la kajtoj iom post iom fariĝis popola amuzilo. En la 10-a jarcento, t.e. en la tempo de la Kvin Dinastioj, la paperaj agloj alinomiĝis “feng-ĝeng”, kiu en la ĉina lingvo signifas kordmuzikilon ludatan en vento. Tiam la senĉese plibonigita kajto kun fluto kaj silka

arko povis eligi sonojn kiel kordmuzikilo, tial ĝi ricevis la nomon, kiu daŭris ĝis hodiaŭ.

En aprilo ĉi-jare mi ĉeestis la inaŭguron de la Internacia Kajta Festivalo en la stadiono de Ŭejfang. En la sekvanta tago mi rigardis kajtoflugigon ĉe la suda marbordo de Bohaj-maro 25 kilometroj for de la urbo.

Frumatene ĉ. 200 000 rigardantoj svarmis tien el diversaj flankoj.

Komenciĝis la flugigo. La multkoloraj vivoveraj kajtoj en

formoj de hirundo, vesperto, libelo, papilio, aglo kaj gruo flugis en la ĉielon. La denskoloraj kajtoj de okcidentaj landoj kaj la buntaj kajtoj de Japanio ŝvebis en la sunlumo. La tendforma kajto el Nederlando, giganta kiel flugpilkejo, estis eble la plej granda en la mondo.

Ju pli fortiĝis la vento, des pli grandiĝis la intereso pri la kajtoflugigo. Oni hurais, kiam iu kajto flugis supren kontraŭ la vento, kaj bedaŭris, kiam iu kajto falis. Estis neflugigebla kajto. Iuj kajtistoj el Tajlando faris kestoforman kajton de 100 kvadrataj metroj kun malpeza metalo kiel muntaĵo. Ili intencis porti per ĝi homon al la ĉielo, sed ĝi tuj falis, nur iom sin levinte.

Subite aŭdiĝis hurao. Iu kajtoflugiga grupo, tenante skolopendran kajton kun draka kapo longan je 2 000 metroj kaj altan je dekoj da metroj, kuris tra la ludejo. La korpo de la kajto konsistanta el 100 rondaj kajtetoj estis tirata de ŝarĝaŭto por ekflu-

La inaŭguro de la Internacia Kajta Festivalo en Ŭejfang





Ĉinaj kaj alilandaj kajto-amantoj



Flugigas japanaj kajtistoj.

go. Oni unue iom post iom levis la korpon kaj voston de la kajto kaj poste ĝian kapon kun helpo de la levforto produktita de la rondaj kajtetoj. La kajto kiel giganta drako serpentis en la blua ĉielo. Krom la skolopendra kajto, reprezenta verko de Ŭejfang, ankaŭ ties aglokajto havis apartan stilon. Ĝiaj kapo kaj korpo estis reliefaj kaj du flugiloj plataj. Rigardate de malproksime, ĝi aspektis kiel vera aglo fluganta en la ĉielo. Ne estas senkaŭze, ke oni diras, ke ĉiuj birdoj forflugas pro timo dum leviĝo de aglokajto.

En la kajtoflugigejo mi vidis la 67-jaran Zoŭ Liguj, prezidanton de la Kajto-Asocio de Ŭejfang. Li sciigis min, ke la vilaĝo Jangĝjabu proksime de Ŭejfang estas fama pro novjaraj ksilografaj kaj kajtoj. Ĝiaj kajtoj havas karakterizaĵojn de novjara pentraĵo. Krome, iuj kajtoj montras epokan fizionomion. La kajto "Trifoja Ĉampioneco" kun pentrita ĉina sportistino forte batanta flugpilkon super la reto vekis grandan intereson ĉe la rigardantoj.

Sinjoro Zoŭ diris al mi, ke jam en la 50-aj jaroj kajtoj de Ŭejfang estis eksponataj en Japanio, Francio, Kanado kaj FR Germanio kaj laŭdataj de fremdlandaj kajto-amantoj. Post 1982 oni an-

kaŭ sendis kajtistajn grupojn al Usono kaj Nov-Zelando por prezenti kajto-flugigon. En la lasta jaro en Ŭejfang okazis la Unua Internacia Kajta Festivalo. Ĝi estis malpli granda ol la nuna, partoprenata de 15 kajtistaj grupoj el Usono, Nederlando, FR Germanio, Japanio, Singapuro, Italio, Nov-Zelando, Tajlando, Hongkong kaj Ŭejfang. Oni decidis okazigi en Ŭejfang la Internacian Kajtan Festivalon ĉiujare en la 1-a de aprilo.

Sinjoro Zoŭ diris al mi ankaŭ, ke la kajtoflugigo estas ne nur amuzo, sed ankaŭ unu el la manifestiĝoj de amikeco inter la popoloj de diversaj landoj.

Kiam ekflugis nederlanda kajto, malfermiĝis multaj ĝiaj rubandoj kun vortoj "amikeco inter Nederlando kaj Ĉinio". Tiam tuj leviĝis hurao kaj aplaŭdo de la rigardantoj. En la kajtoflugigejo iu maljunulo el Seattle de Usono renkontiĝis kun Sun Jongĉun, konsilanto de la Kajto-Asocio de Ŭejfang. Ili ĉirkaŭprenis sin. La usona amiko humure diris al sinjoro Sun: "Vi film-stelo!" Mi ne kaptis la sencon.

Estis interesa travivaĵo. Post la Unua Internacia Kajto-kunveno okazinta en Ŭejfang en 1984 laborantoj de iu usona studio venis al Gujlin, fama ĉina turisma urbo, por fari filmon pri farado

kaj flugigo de kajtoj. Kiel malnova amiko de Ŭejfang, tiu usona gasto sincere invitis Sun Jongĉun roli kiel veterana artisto. Por filmado ili diskutis pri tekniko de kajtofarado kaj studis arton de aktora prezentado. La du malnovaj "aktoroj" estis kvazaŭ nedisiĝblaj fratoj.

La laboristoj de la Ŭejfang-a Trikejo, partoprenantaj la kajto-flugigon, faris studan kajton, kiu vekis intereson de japanaj amikoj. La estro de la kajta delegacio de la urbo Hamamacu de Japanio diris al ĵurnalistoj: "En Japanio testudo simbolas longvivecon kaj bonaŭgurecon. La amika ĉina popolo faris tian kajton por plene esprimi nian bondeziron. Ni deziras, ke la amikeco inter Japanio kaj Ĉinio longe vivu kiel testudo."

Pri kajtoj mi iam havis rememoron nur en mia infaneco. Kiam mi okaze preteriris Tjan'anmenplacon en Pekino, kie oni flugigis kajtojn, mi haltis por rigardi. Tamen la ĉi-foja internacia kajto-prezentado ne nur donis al mi impreson de amuzo, sed ankaŭ servis kiel ilo por vastigi la internacian kulturen interŝanĝon kaj profundigi la amikecon inter la popoloj de diversaj landoj.

(Koloraj bildoj de tiu ĉi artikolo troveblaj interne de la dorskovrilo)

LA RELIGIA KREDO DE TIBETANOJ

de LANG ĜJE

La budhisma aktivado de Gamaĉuomu probable estas tre tipa en Tibeto, kie preskaŭ ĉiuj loĝantoj estas lamaismaj kredantoj.

Ĉiumatene je la sepa antaŭ la tagiĝo, ŝi ellitiĝas. Ŝi bruligas incenson antaŭ la budha niĉo, prezentas sanktan akvon kaj silente preĝas kelke da minutoj antaŭ la portretoj de Ŝakjamunio kaj Conkapa, kun kunmetitaj manplatoj. Poste, kun preĝrado en la dekstra mano kaj rozario en la maldekstra, ŝi eldomiĝas kaj iras laŭ la Okangula Strateto ĉirkaŭ la templo Daĝaŭ trifoje. Ĉ. duonon post la oka ŝi revenas hejmen kaj preparas manĝon por sia ses-membra familio.

Tio estas ŝia kutimo de multaj jaroj. Ĉiutage en la tuta jaro, ĉu en pluvo, ĉu en vento, ŝi neniam ĉesis fari tion.

La 55-jara ordinara tibetano Gamaĉuomu loĝas sude de la templo Daĝaŭ en Lhasa. Ŝiaj edzo kaj tri filoj laboras en fabriko. Ŝi ne admonas siajn filojn al lamaismo, kaj la lastaj ne malhelpas ŝin en la budhisma aktivado. Tage ŝi faras dommastrumadon, flegas sian nepineton kaj ne havas tempon por kulto. En ĉiu religia festo ŝiaj familianoj faras dommastrumadon, por ke ŝi kun butera lampo iru al la templo por fari kul-ton.

Ŝi estas analfabeto kaj ne povas argumenti, pro kio ŝi kredas je religio. Sed ŝi firme kredas, ke la piaj kredantoj al la Budho

evitos transterajn punojn kaj eĉ iros en la paradizon, gvidate de la Budho.

La kredo "la transmonda vivo destinita de la nuna" estas gvida penso de plejparto de la kredantoj. Multaj el ili ne povas legi la budhismajn sutrojn kaj havas nur malklaran konon pri la budhisma doktrino, sed ilia pieco estas mirinda. Tion sentas pli klare alilokanoj, ĵus venintaj al Tibeto.

En Lhasa okulfrapaj estas la majesta Potala-palaco kaj la templo Daĝaŭ ĉirkaŭita de ruĝa muro kaj kun ora tegmento. Koloraj oblongaj sutroflagoj flirtas super stratoj ĉe la palaco, kvazaŭ koloraj flagoj bonvenigantaj gastojn.


Antaŭ la pordo de la templo Daĝaŭ, por esprimi sian piecon al la Budho la budhistoj adonis tutkorpe surtere unuj post aliaj kaj foje-refoje. Antaŭ miloj da budhostatuoj en la templo fumoj leviĝas el incensuoj kaj lumas buteraj lampoj. La kredantoj, kun kunmetitaj manplatoj antaŭ la brusto kaj fermitaj okuloj esprimas sian deziron al la Budho murmurante.

Kial la tibetanoj estas tiel piaj al budhismo? Historio montris, ke antaŭ 1 000 jaroj la tibetanoj komencis kredi je budhismo. Kaj antaŭ 1 300 jaroj la tibetanoj kredis je la loka primitiva religio Benĝjaŭ, simila al Saman-religio

Malgranda preĝejo sur strato de Sigaze

Foto de ŜJE ĜJUN





Antaŭ Daĝaŭ-templa

Foto de ĈENG MINGGUJ

de centra Azio, Siberio kaj nord-orienta Ĉinio. En ĉ. la kvina jarcento budhismo estis enkondukita en Tibeton. Sed pro manko de skriba lingvo tiam oni ne povis traduki budhismajn sutrojn, kaj plie, pro opono de Benĝaŭ-religio, budhismo ne ricevis disvolviĝon. En la sepa jarcento Sunzamkampo unuigis Tibeton kaj fondis la reĝlandon Tubo. Princino Ĉizun de Nepalo kaj princino Ŭenĉeng de Tang-dinastio edziniĝis al Sunzamkampo, la reganto de Tibeto. Ili, pias budhistinoj, ambaŭ kunportis en Tibeton statuon de Ŝakjamunio, budhismajn sutrojn kaj muzikilojn por budhisma rito. Tial Sunzamkampo komencis subteni budhismon kaj ordonis traduki en la tibetan lingvon la sutrojn, enkondukitajn el la landinterno de Ĉinio, Nepalo kaj Hindio, tiamaniere budhismo disvastiĝis tra la

Tibeta Altebenaĵo. Poste, dank' al subtenado de regantoj de pluraj periodoj, budhismo iom post iom fariĝis religio, kredata de la tuta Tibeta nacio. Inluate de Benĝaŭ-religio, ĝi formiĝis en lamaismon kun tibeta originaleco. En malsamaj historiaj periodoj ĝi disiĝis en malsamajn sektojn. Inter la fino de la 14-a jc. kaj la komenco de la 15-a jc. Konkapa reformis la religion kaj kreis la flavan sekton, kiu poste fariĝis la plej influa sekto. En Tibeto la plej famaj temploj, kiaj Ĝebang, Sela, Daĝaŭ kaj Ĝaŝilunbu, estas flav-sektaj.

En la pasintaj pli ol 1 000 jaroj budhismo havis profundan influon en ĉiuj flankoj de la tibeta socio kaj havis sendependan ekonomian forton de la templaj klerikoj. Laŭ statistiko farita en la demokratia reformo de Tibeto en 1959, la tuta Tibeto havis pli ol

2 700 templojn kun 39% de la tibeta agraro. Kaj krome, la temploj posedis rimarkindan kvanton da paŝtejoj. Tiam en la tuta Tibeto estis 110 000 gemonahoj, kiuj estis dekono de la totala loĝantaro. Plejparto de la monaĥoj ne partoprenis en produktado kaj estis malpermesite por ili geedziĝi kaj naski. Produktadon plenumis ĉefe pli ol 100 000 servutuloj kaj sklavojoj de la temploj.

Ekde la mezo de la 13-a jarcento Tibeto starigis la reĝimon kombini registaran administradon kun religio. La administraj gvidantoj de la Tibeta Loka Registaro estis ankaŭ tiuj de iu religia sekto. Ankaŭ monaĥo-oficistoj plenumis oficon en diversnivelaĵoj registaroj. La reĝimo daŭris pli ol 700 jarojn.

Budhismo havas pli profundan influon sur la kulturon kaj socian

vivon de Tibeto. Oni povas diri, ke la antikvaj kulturo kaj arto de Tibeto havis intiman rilaton kun religio. Antaŭ la Liberiĝo la temploj estis lokoj por budhisma aktivado kaj centroj de la tibeta kulturo. La majestaj kaj ore brilantaj temploj havas altan arkitekturan nivelon. La tieaj skulptaĵoj kaj freskoj eĉ konfuzas okulojn de la rigardantoj. Ekz., en la templo Daĝaŭ konstruita en la 7-a jarcento estas freskoj de 4 400 kvadrataj metroj kun enaĵoj pri historiaj eventoj, biografio, ĝenro, legendoj, mitoj kaj religiaj doktrinoj, rigardataj kiel enciklopedio de la tibeta civilizacio. En la grandaj temploj konserviĝas granda kvanto da sutroj kaj klasikaj verkoj pri literaturo, historio, geografio, filozofio, medicino, astronomio kaj kalendara kalkulo.

La religiaj ideologio kaj aktivado okupas gravan lokon en la ĉiutaga vivo de la tibetanoj kaj penetriĝis en vestadon, loĝadon, manĝadon kaj sanstaton. Eĉ la nomoj de tibetanoj plejparte rilatas kun religio. Ekz., Dŭoĝji el la plej ofte uzataj nomoj signifas vajron en la tibeta lingvo, Ĉjunpej — religian prosperiĝon Lamu — feinon, Zŭoma — Dumu, diinon de la lamaismo.

La ĉina konstitucio difinas, ke ĉiu civitano havas liberon kredi aŭ ne kredi je religio. La religianoj kaj nereligianoj ĝuas egalan rajton en politiko, ekonomio kaj kulturo, kaj la normala religia aktivado de religianoj estas protektata de la registaro. De 1951, kiam Tibeto estis pace liberigita, ĝis antaŭ 1966, kiam la kultura revolucio komenciĝis, en Tibeto la temploj estis protektataj kaj normale iris la religia aktivado de monaĥoj. Tamen dum la kultura revolucio, same kiel aliaj

lokoj de Ĉinio, Tibeto dronis en tumulto. Preskaŭ ĉiuj temploj estis detruitaj, escepte de la famaj temploj Daĝaŭ, Ĝebang, Sela, Ĝaŝilunbu kaj Saĝĵanan, religiaj objektoj estis grandnombre perditaj kaj la religia kredo de la loĝantoj estis kritikita.

Post la Tria Plena Sesio de la 11-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu okazis decembre de 1978, ĉiuj flankoj de la socia vivo de Ĉinio denove suriris ĝustan vojon. La reviziita ĉina konstitucio denove deklaris, ke la ŝtato respektas kaj protektas la rajton, ke civitano havas la liberon kredi je religio. En la kunvenoj pri la tibeta laboro okazigitaj de la sekretariato de CK de KPCĈ en 1980 kaj 1984 la problemoj pri religio estis unu el la gravaj problemoj diskutitaj.


Inter 1980 kaj 1984 la koncernaj departementoj de la Ŝtata Konsilantaro kaj la Tibeta Aŭtonoma Regiono asignis 13 milionojn da jŭanoj (2.8 jŭanoj egalas unu usonan dolaron) por ripari la templojn. Nun 75 temploj kaj preĝejoj estas riparitaj kaj riparataj. La popola registaro de la aŭtonoma regiono decidis restarigi kaj malfermi 200 templojn antaŭ la fino de la 80-aj jaroj kaj samtempe riparos pliajn templojn. Koncernaj departementoj de la tibeta registaro disdonis al la temploj pli ol 300 tunojn da trovitaj kaj kolektitaj latunaj budhostatuoj, budhismaj kaj lamaismaj objektoj, inkluzive de latuna statuo de Ŝakjamunio, kiun alportis al Tibeto nepala princino, kiam ŝi edziniĝis al Sunzamkampoj antaŭ 1 300 jaroj.

Nun paŝon post paŝo eliminiĝas la skrupuloj de la religiaj personoj kaj la religianoj kaŭzita de la kultura revolucio. En temploj

denove eksonas sonoriloj kaj aŭdiĝas sutrorecitado de lamaoj. En la temploj de Tibeto nun troviĝas pli ol 2 000 lamaoj, ili ĉiutage faras budhisman aktivadon, zorgas pri historiaj objektoj de la temploj kaj studas pri budhismo. La administra komitato el lamaoj faras demokratian administradon en templo. Fininte la budhisman aktivadon, la lamaoj laborkapablaj okupiĝas pri produktado de agrikulturo, brutobredado kaj kromokupoj kaj proprigas al si la enspezon. Samtempe ili ĝuas sufiĉe grandan nombron da almozoj donitaj de popolamasoj. La templo Sela, unu el la tri grandaj temploj de Tibeto, havas 300

*Tibeta maljunulo
trapreĝanta rozarion*

Foto de ĈENG MINGGUJ





*La juna viva budho Bilong
(dekstre) en la templo Ĝaŝilunbu*

Foto de **SIN HŪA**

grupeto unu staranto demandas aliajn membrojn. Se la demandito ne povas respondi, la demandanto tuj ekkrias manklakante kaj ŝvingas la rozarion super lia kapo por esprimi sian venkon. La "Demandoj pri Sutro" ĉefe enhavas budhisman logikon. Logika rezonado estas deviga lernobjekto por la lamaoj en Tibeto. Instruate de naŭ veteranaj bonedukitaĵaj lamaoj, ili lernas diligente. Krom la ĉiutaga recitado de difinita sutro kaj partopreno en budhisma aktivado, ili devas mem lerni du horojn en vespero. Antaŭe lamao devis studi 20-30 jarojn por akiri Gesi (lamaisman titolon), sed dank' al nunaj favoraj kondiĉoj de la lernado kaj vivo, por ĝin akiri jam sufiĉas dekelkaj jaroj.


La religia aktivado en Tibeto okazas ĉefe inter la lamaismaj popolamasoj. Ĉiujare la pilgrimantoj el aliaj lokoj de Tibeto kaj Ĉinghaj, Siĉŭan, Gansu kaj Junnan al Lhasa superas cent mil, pli multe ol tiuj antaŭ la demokratia reformo en 1959. Tiam la servutuloj kaj sklavoĵoj, kiuj konsistigis plejparton de la loĝantaro, ne havis personan liberecon kaj ne povis veni al Lhasa. Abundas religiaj feliĉaj tagoj kaj festoj en Tibeto! La 8-a, 10-a, 15-a, 25-a kaj 30-a de ĉiu monato laŭ la tibeta kalendaro estas religiaj tagoj. En tiuj tagoj la budhistoj devas pilgrimi al la templo. El la religiaj festoj la plej solena estas la 15-a de la kvara monato laŭ la tibeta kalendaro. Tiam oni celebras la naskiĝon de Ŝakjamunio kaj la feston Sagdava de konscio kaj nirvano. Frumatene de tiu tago leviĝas fumo ĉe la rivero Lhasa kaj la ĉirkaŭaj montpintoj. Dekmiloj da adeptoj kun buterlampoj en la manoj pilgrimas al la grandaj temploj de Lhasa. Ankaŭ la lamaoj faras solenan budhisman aktivadon.

lamaojn, kiuj en 1984 ricevis meznombro po 1 400 jŭanojn, el kiuj duono venis el almozoj. La vivkosto de la lamaoj, perdintaj laborkapablon, estas tute pagata de la ŝtato. Ĉiuj lamaoj ĝuas senpagan kuracadon.

Nun multaj lamaoj en la tibetaj temploj estas grandaĝaj kaj mankas daŭrigantoj de la budhisma afero. Por elkulturi profesiajn personojn kun fakaj religiaj scioj, la registaro de la aŭtonoma regiono en 1983 fondis la Tibetan Budhisman Instituton. Nun ĝi havas 140 lernantojn. Ĉiuj elspe-

zoj en la lernado estas pagataj de la ŝtato.

Ĉiuj temploj atentis pri kulturado de junaj lamaoj. La templo Sela jam akceptis 160 junajn lamaojn, kiuj estis elektitaj el la volontaj gefiloj de kamparanoj, paŝtistoj kaj urbanoj. Enirinte templon, ili devas diligente lerni kaj trejni kelkajn jarojn. Ili devas lerni gravan lernobjekton "Demandoj pri Sutro". Dum la lernado 160 junaj lamaoj, en purpur-ruĝa stolo kaj kun rozario en la mano, estas dividitaj en naŭ grupetojn kaj runde sidas sur ŝablejo de la templo Sela. En ĉiu



Ĉiujare, de aprilo ĝis junio, la grandaj temploj en Tibeto festas la Feston de Sunumado de Budho, dum kiu oni elmetas al la suno grandan broditan budhoportreton, por ke la lamaistoj preĝu.

Foto de MA ĜINGĈIŬ



Lamaoj aŭskultas predikon.

Foto de ŜJE ĜJUN



Statuo de Śakjamunio en Daĝaŭ-templo

Foto de **ŜJE ĜJUN**




Lamaoj murmuris sutron.

Foto de
ĈENG MINGGUJ



La Festo de Liberigo de Vivaj Birdoj kaj Fiŝoj festata unufoje ĉiujare en Tibeto

Foto de MA ĜINGĈIU



Lamaoj en la templo Ĝaŝilunbu tamburante murmuris sutron. Foto de ŜJE ĜJUN

La viva budho Banĉen benas preĝantojn per kareso de ilia verto.

Foto de ĈENG MINGGUJ

Enhavo

Por celebri la 35-an datrevenon de la fondiĝo de El Popola Ĉinio:

Festo de esperantistoj	5
Gratulo kaj espero	10
En rolo de Esperanto EPC havas ankaŭ sian parton	12
Grava funkcio de EPC	13
La socia prestiĝo de Esperanto en Ĉinio	14
Krei interkomprenon kaj amikecon	15
Per EPC ni scias ĝuste Ĉinion	15
Gratulaj vortoj de polaj kaj usonaj esp-istoj	16

Esperanto:

Granda humanisma faro	18
La naskiĝo de neologismoj	20
Esp-novaĵoj	22
[Por komencantoj]: Kiu estas la mastro de kabano?	17

Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (9): La religia kredo de tibetanoj 61

Malfermitaj urboj: Kantono — la suda pordo de Ĉinio 36

Trafiko: Pasaĝera hejmo 28

Folkloro: Pri la internacia kajta festivalo en Ŭejfang 59

Novelo: Kiam pluvis 42

Sporto: Kiel sportas kamparanoj de Ŝandong? 45

Junuloj: Antaŭen strebantaj junuloj de Ĉinio 25

Naciecoj: Posteuloj de garnizonanoj antaŭ 220 jaroj 48

Vojaĝo tra Ĉinio: Ĝardena urbo Suĝou 30

Enciklopedieto de Ĉinio: La arkiva konservado de Ĉinio 57

Amikeco: Kantistino honorita per floroj 40

Internacia problemo: Memoru lecionojn de la milito, defendu la mondpacon! 54

Kurantaj aferoj 52

Inter ni: Kritikoj kaj proponoj 27

Ĉinlingva kurso 24

SUR LA KOVRILO: Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj fondinto de "El Popola Ĉinio", en la te-kunsido okaze de la 35-jara jubileo de EPC
Foto de Ĉju Ŭejbo

SUR LA DORSKOVRILO: Korala skulptaĵo
Foto de Haj Feng


Pri la Internacia Kajta Festivalo en Ŭejfang

Fotoj de MENG ZI
kaj ĈEN HONG

Kajtoj kun homfiguroj




Skolopendra kajto kun draĝa kapo



Buntaj feniksa kaj sovaĝanseraĵaj kajtoj



Partoprenantoj de la Internacia Kajta Festivalo en Ŭejfang



世界语·中国报道·一九八五年第九期(本刊代号:二——九一五)北京市期刊登记证第692号